



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Aprilo 2018 n-ro: 28



Merhaba,

Dergimizin Nisan sayısı ile gene karşınızdayız. Bu sayıda gene aralarında bazıları doğrudan dergimize gönderilmiş orijinal yazılar olan çok sayıda ilginç yazılar var. Bunlardan bazıları kolay okunabilecek yazılar ve dilinizi geliştirmek için okumaya çalışmanız yararlı olacaktır.

En ilginç yazılardan bazıları:

- Bulgaristan'dan Vladimir Jelev'in "ROZO" adlı bir hikayesi
- Fransa'dan Gioia Albano'nun John Steinbeck'in kitabı "Gazap Üzümleri"nin bir eleştirisi.
- Arnavutluk'tan Adi Olluri'ni bir hikayesi "Rüyalar Pazarı".

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Jen la aprila numero de nia revueto. En ĉi tiu numero denove estas interesaj artikoloj, kaj kelkaj el ili estas originalaj teksto senditaj rekte al nia revueto. Kelkaj el ili estas facilaj rakontoj do la progresantoj devas provi legi ilin por plibonigi siajn lingvoscion.

Aparte interesaj povas esti:

- La rakonto de Vladimir Ĵelev el Bulgario "ROZO".
- La recenzo de Gioia Albano el Italujo pri la libro de John Steinbeck "Vinberoj de Kolero".
- La rakonto de Adil Olluri el Albanujo "La Foiro de Songoj".

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Itala Esperanto Kongreso	4
La ploranta knabeto	4
Kosmolingvo	5
Facilaj Rakontoj	5
Adoniso	6
Dialogo inter Luiza CAROL kaj Mirejo GROSJEAN (parto 4)	8
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 2)	9
Rozo	10
Esperanto programo en Kastelo Greziljono	11
Novaj Esperantaj Libroj de Julian Modest	12
La vinberoj de Kolero	13
La Foiro de la Sonĝoj	14
La Karnavalon en Salono de Ŝaono	15
Ŝercoj	16
Kurcvortenigmo	17
Dankon Amiko (14)	18
Niaj Homoj	19
Vojaĝo al Esperantujo	19
El la libro de "Dao de Jing" (20)	20
Mallonga Historio de Filozofio (27)	21
Esperanto en Interreto (parto 2)	22
Trairado - Poemo	23
La veroj kaj malveroj pri hipnoto	24
Financa laborgrupo volas ke UEA draste ŝparu	25
Kiom ajn la prezo, Bitmono estas monaĉo	27
Laŭ ĉies plaĉo	29
La printempa bulgara popolkutimo "Avino Marta"	30
Historiaj periodaĵoj nun rete traserĉeblaj	30
Hundolingvo	31
Veganarto	32
Kalendaro pri Esperanto-Renkontiĝoj	32

Kursoj



- 1) Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 5 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar. La alia kurso, kiun gvidis Nicola Sarmiento bedaŭrinde perdis siajn lernantojn.
- 2) La pagata kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto ĉe ÖBD Sciencfikcia Biblioteko kies gvidanto estis Murat Özdizdar estas haltigita kaj ŝajnas ke ĝi ne plu refunkcios.
- 3) Finis la Esperanto kurso ĉe Çırac Atölye en Çağaloğlu distrikto en la Eŭropa parto de Istanbul, kiun gvidis Vasil Kadifeli. Entute 8 lernantoj finlernis la lŝbron de Stano Marček "Esperanto per Rekta Metodo".
- 4) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.
- 5) Finis la enkonduka kaj rapida kurso de Esperanto kiu okazis en Avcılar Kozmos Yazılım Lisesi lernejo kadre de la projekto "Unu lerneja horo pri Esperanto". La kurson gvidis Vasil Kadifeli. En la fino de la kurso 11 lernantoj inkluzive la instruisto Çağakan Aydın ricevis atestilojn. La lernantoj lernis el la libro de Stano Marček "Esperanto per Rekta Metodo" kaj dum la kvarleciona kursodaŭro ili lernis preskaŭ duon de la libro. La lernantoj nun lernas kune kun sia instruisto pere de la video serio "Mazi en Gondolando"



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La marta Eperanto-Sumoo komencis la 18-a de marto kaj daŭros ĝis la 1-a de aprilo. Do, ni informos vin pri la

rezultoj en la sekvanta numero de Turka Stelo.

Jen la mesaĝo de Radojica Petroviĉ el Serbio, Estrarano pri kongresoj de ILEI

Karaj,

*Jen plia kialo por gratuli s-ron **HORI Jasuo** pro lia longdaŭre sukcesa projekto de Internacia Esperanto-sumoo, tiom grava por la kulturo de Esperanto. ILEI jam plurfoje esprimis sian subtenon kaj, inspirita de tiu projekto, enkondukis novan programeron - Literaturan Kafefon - en programon de siaj kongresoj. La 51-a Kongreso de ILEI kaj 77-a Hispana Kongreso de Esperanto (Madrido, 20-28 julio 2018, <http://www.ilei.info/agado/Madrido2018.php>) kun la komuna ĉeftemo "La kultura heredaĵo de Esperanto" estos bona loko por renkontiĝo de Esperanto-sumoanoj kaj interŝanĝo de iliaj spertoj kaj impresoj. Eblas aliĝi per <https://goo.gl/forms/Nmaj3BLQrrzLyuzz2> aŭ www.ilei.info/konferenco/2018/Aligxilo2018printebla.pdf.*

Amike, Radojica



UEA



N-ro 729 (2018-03-08)
Internacia Virina Tago, 8 marto 2018
Kiel ĉiujare
Universala Esperanto-

Asocio partoprenas kun entuziasmo la festadon de la Internacia Virina Tago. [...]

N-ro 728 (2018-02-23) **Semajno de Internacia Amikeco (SIA) 2018**

La sukcesoj de la jubileaj kampanjoj, kiel ekzemple la pasinta Zamenhof-Jaro 2017 pravas, ke diversaj datrevenoj estas elstara okazo por aparta aktiviĝo ene de la E-komunumo kaj ekster ĝi. [...]

N-ro 727 (2018-02-21) **Seminarioj de ILEI en Madrido kaj Kotonuo por trejni instruistojn: aliĝu!**

ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, zorgas pri la instruado de Esperanto laŭ kontrakto kun UEA. [...]

N-ro 726 (2018-02-19)
Afrika Komisiono de UEA serĉas kunlaborantojn
Evoluis la ideo pri "Oficejo de Afrika Komisiono de UEA" sub la ĉefa respondeco de la komisiono. [...]

N-ro 725 (2018-02-19)
21a de februaro 2018 Internacia Tago de la Gepatra Lingvo
La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako (Orienta Banglujo), ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo plurajn manifestaciantajn studentojn. [...]

TEJO



TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan

Okazaĵon en Strasburgo

La 1-a kaj 2-a de junio 2018, TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan Okazaĵon – European Youth Event en Strasburgo, kun delegacio de preskaŭ 30 junaj Esperantistoj. Pluraj miloj da junuloj renkontiĝos dum la dutaga evento en kaj apud la Parlamentejo de Eŭropa Unio. Estos organizitaj konferencoj, plenaj sesioj kaj metiejoj, sed ankaŭ koncertoj kaj multaj aliaj neformalaj aktivaĵoj. [...]

TEJO is looking for an EVS volunteer! (2018-2019)

As part of the European Voluntary Service, TEJO invites you to become a full-time volunteer in our Central Office in Rotterdam, the Netherlands. Being a volunteer doesn't only mean contributing to the well-being of the organisation, but it is at the same time a personal development. [...]

Nova numero de Revuo Kontakto: Pluramemo – Novaj difinoj kaj defioj en amrilatoj

La nova numero de Revuo Kontakto ĵus aperis en la reto! La ĉeftemo de la numero estas Pluramemo – Novaj difinoj kaj defioj en amrilatoj. La abonantoj povas elŝuti la elektronikan version de la revuo. La redaktoro de Kontakto Rogener Pavinski enkonduke skribas:

"Mi nuntempe legas libron de la 1990-aj jaroj nomatan Mi pensas, do mi trompiĝas, de Jean-Pierre Lentin. [...]"

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Interesaj materialoj, kiuj mi tralegis du fojoj.
Angel Maglov, el Bulgario



La revuo Turka Stelo estas belega!
Maria Nazare Laroca, el Brazilo



Dankon kaj gratulon pro la revueto kiel ĉiam kun intereseĝaj artikoloj kaj belaj fotoj.
Evandro Cabolco, el Brazilo



Gratulojn kiel kutime.
Renato Corsetti, el Italujo



Ni vidis, ke vi publikigis/as novan revueton "Turka Stelo". Ege volonte ni kolektos, konservos kaj disponigos vian revueton, ankaŭ por futuraj generacioj. Tial mi ŝatus demandi vin, ĉu vi emas regule sendi al ni vian periodaĵon?
Bernhard Tuiders, el Aŭstrio



Vi faras revuon sufiĉe diversan, kaj ĉiu leganto povas trovi ion por sia gusto. Mi deziras al vi daŭran sukceson.
Ginette Martine, el Francujo

Vi devas esti juna, almenaŭ spirite, por aliĝi al la Kongreso de Esperanto en Italujo

Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Vi devas esti juna, almenaŭ spirite, por aliĝi al la Kongreso de Esperanto en Italujo, **18/25-08-2018**

Ni ne diskriminacias kongresanojn laŭ la aĝo, sed vi konsciu, ke nia kongreso havas fortan junularan parton, kiun neniu estas devigata partopreni, sed kiun ĉiuj volas partopreni. Spirita juneco estas bezonata por tio.

Unue estos la tiel nomata "trinka-manĝa nokto". Ĉiuj

partoprenantoj provizas tipajn manĝojn el sia lando kaj kune oni formanĝas ĉion. Rakonti ŝercojn kaj ridi je ili estas parto de la nokto.

Sekvos poste nokta promenado tra Sanmarino. Oni rajtas elfali el la komuna promenado kaj daŭrigi duope, kiam ajn. Trezor-ĉasado estas programo, kiu

ne povas okazi nokte [nokte ĉiuj trezoroj estas grizaj, diras la diraĵo], kaj do tenos vin okupata dum mateno aŭ posttagmezo.

La premio konsistas el la rajto trinki vinon senpage kaj senlime dum la programero "Vingustumado", kiu, laŭ la nomo, konsistas el gustumado de loka vino [en Italujo ĉiu vilaĝo scias, ke la propra vino estas la plej bona en la lando. Sanmarino el tiu vidpunkto etas nur itala vilaĝo kaj ne sendependa lando.] Ni parolu ankoraŭ pri unu junulara programero: foto-konkurso [fotoj ankaŭ per poŝtelefono permesataj] pri difinota temo, ekzemple "la interna ideo". Fine de la semajno la plej belaj fotoj pri la temo estos elektataj kaj premiataj.

Nun vi verŝajne jam komprenis, kial vi sendepende de via aĝo devas aliĝi al la Kongreso de Esperanto en Italujo, kiu okazos de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2018. Iru tuj al la paĝo <http://kongreso.esperanto.it/85/modulo.htm> kaj aliĝu.

La LKK

<http://kongreso.esperanto.it/85/>

La ploranta knabeto

Knabeto ploras sur la strato. Virino alpaŝas lin kaj ŝi demandas:

- Kial vi ploras knabeto? Ĉu vi ne trovas viajn gepatrojn? Venu ni serĉos ilin!
- Miaj gepatroj estas hejme. Mi ploras ne pro ili.
- Nu, diru, kio okazis al vi! Certe li perdis vian ludilon. Ĉu ne?
- Ne.
- Diru jam al mi, kial vi ploras! Mi deziras helpi al vi.
- Mia tradukmaŝino ne funkcias.
- Ĉu vi havas tradukmaŝinon?
- Jes.
- Kun kiuj vi volas babiladi per ĝi?



facila rakonto

- Kun eksterlandanoj, sed nun mi ne povas.
- Eble ili scias nian gepatran lingvon kaj vi ne bezonas tiun maŝinon.
- Ne. Ili scias nur anglan, francan, germanan, rusan, hispanan lingvojn, sed ili ne scias la nian.
- Ĉu tiu tradukmaŝino povas traduki tiujn lingvojn.
- Jes kompreneble, ĝi povas traduki ĉiujn ekzistantajn lingvojn sur la terglobo. Bedaŭrinde ĝi ne funkcias. Ve!
- Kion vi volis diri al ili?
- Ili lernu Esperanton, ĉar ĝi estas la plej bona kaj la plej utila lingvo en la mondo



Verkis: **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

La kosmoŝipo proksimiĝis al la planedo. La pasaĝeroj jam malpacience atendis la alvenon. Ili ekiris antaŭ tri teraj jaroj. Supozeble sur tiu ĉi planedo estas inteligenta vivo. Ĝin pruvas la radiosignoj per kiuj la ĉi tieaj estaĵoj bombardas Teron.

Verdire ankoraŭ neniu scias, kiel ili aspektas. Ĉu ili similas al homo, aŭ ili estas tute aliaj.

Baldaŭ la pasaĝeroj de la kosmoŝipo ekscios. Ili ekscitite atendis la renkontiĝon. Ĝis nun ankoraŭ la homaro ne renkontiĝis persone kun eksterteruloj.

Ili kunportis la plej modernajn tradukmaŝinojn por ke ili plifaciligu la komunikadon. Tiuj ĉi grandiozaj maŝinoj povas traduki ĉiujn lingvojn ekzistantajn sur la terglobo. La sciencistoj opinias, ke ili funkcios senprobleme ankaŭ sur tiu ĉi fora planedo.

Sur la ekrano ekaperis informo, ke post duonhora komenciĝos la surplaneliĝo. La astronautoj prepariĝu.

En tiu situacio la minutoj rampas tre malrapide. Ili ĉiuj jam volonte promenadus sur la surfaco de la planedo kaj konatiĝus kun la lokanoj. Laŭ la radiomesaĝoj la planedanoj atendas ilin kaj la loko estas destinita, kien alvenos ilia kosmoŝipo.

Fine ili alvenis bonŝance. Ankoraŭ kelkaj lastaj kontroloj kaj malfermiĝis la pordo. Antaŭ ili tie estis la belega surfaco de la planedo.

Ĝi ege similis al tera pejzaĝo. Oni povus diri, ke ĉi tiu planedo estas dua Tero.

La kosmoŝipo surplaneliĝis sur verdan kaj florantan kampon. En la malproksimo vidiĝis la

konturoj de granda urbo.

Kiam ili surpaŝis la planedon ankaŭ la akceptokomitato ekaperis.

Antaŭ la ekiro, la astronautoj pensis, ke alveninte ili renkontos strangajn estaĵojn, sed ili baldaŭ devis seniluziĝi, ĉar ili similis al teranoj. Eble nur ilia haŭto estis iomete stranga. Ĉar ili estis bluaj, sed same tiel aspektis kiel la tera homo.

Ili funkciigis la tradukmaŝinojn, ĉar la planedanoj salutis ilin.

— Estu salutataj, karaj gastoj! — aŭdiĝis la saluto.

En la sekva momento la gvidanto de la akceptokomitato demandis:

— Kio estas tiu ĉi aparato?

— Tradukmaŝino — respondis la gastoj.

— Ja, vi parolas Esperanton kaj ankaŭ ni ellernis ĉi tiun lingvon. Laŭ mi en la estonto ni ne bezonos tiun ĉi tradukmaŝinon.

La astronautoj forĵetis siajn tradukmaŝinojn kaj komenciĝis senĝena babilado en Esperanto.

— **Ŝaŝa** —

Fonto: **Vesperto #309 februaro 2018**



Facilaj rakontoj

Trezoro

Haĝi Mehmet estis tre riĉa viro. Antaŭ sia morto li venigis al sia lito siajn tri filojn. Ili estis junaj kaj fortaj. La maljuna patro diris: "En nia ĝardeno estas granda trezoro, iru kaj serĉu ĝin!"

"Sed la ĝardeno estas granda, en kiu loko la trezoro troviĝas?" demandis la filoj.

La patro respondis: "Ne, tion mi ne diros al vi. Trafosu la tutan ĝardenon kaj vi certe la trezoron trovos."

La patro mortis. Post lia enterigo la filoj ekfosis. La tutan ĝardenon jam trafosis, sed la serĉatan trezoron ili ne trovis. Por ke ilia laboro ne estu tute vana, ili semis grenon en tiu bone preparitan grundon. Post kelkaj monatoj riĉa rikolto rekompencis ilian laboron. Tio ripetiĝis multajn jarojn, ĝis ili fariĝis riĉuloj. Nur nun ili ekkomprenis, ke la trezoro, pri kiu parolis la mortanta patro, ne estas oro, sed laboro.

El la turka **Mehmet Hulusi Haĝi Mustafa**,
Aidin, Turkio.

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Juĝisto kaj ostro

Promenante laŭlonge de la marbordo, du viroj trovis ostron kaj komencis disputi pri ĝi.

"Mi ĝin vidis unua, do, ĝi apartenas al mi!" diris unu el viroj. "Mi levis ĝin kaj tiel ĝi apartenas al mi!" diris la dua.

Dum ili kverelis, preterpasis juĝisto kaj ili petis lin, ke li juĝu la aferon. La juĝisto konsentis. Sed antaŭ ol doni sian decidon, li diris: "Promesu, ke vi estos kontentaj, kiel ajn mi decidus."

La viroj promesis. Tiam diris la juĝisto: "Ŝajnas al mi, ke vi ambaŭ povas pretendi la ostron; do, mi egale dividus ĝin inter vi."

Malferminte la ostron, la juĝisto rapide englutis ĝin kaj poste li tre solene donis al ĉiu viro unu el malplenaj konkoj.

"Sed vi manĝis mem la ostron," ekkriis la viroj.

"Ho, tio estas mia honorario je mia juĝo en proceso," diris la juĝisto, "sed mi dividis tute juste inter vi ĉion, kio restis."

El la angla **Wimfred E. Carter Bradford**, Yorks, Britio.



Mi opinias, ke kiam ni aŭdas la vorton “beleco”, nia penso kuras al la virinoj. Mi akceptas ke eventuale kelkaj pensas pri la naturo aŭ pri io alia,



tamen mi kredas, ke la plejmulto celas la virinojn. Ĉu ĉar mi rigardas la aferon per okuloj viraj, ĉu ĉar miaj ŝatataj malnovaj historioj parolas ordinaraj pri beleco virina, mi ofte forgesas ke estas ankaŭ viroj bela. Por esti do justa, ĉi tie mi rakontos la historion de Adoniso, de la plej bela viro kiu aperis ĝis nun en nia mondo.

En Asirio (Ασσυρία) estis iam reĝo nomata Tiaso (Θείας), kiu, krom ĉio alia, havis tre belan junan filinon.

La beleco estas ja forto granda, sed ankaŭ danĝera, precipe kiam temas pri neordinara beleco virina. Mi pensas pri tio, ĉar ni ĉiuj scias, ke virino eksterordinare bela ofte iĝas tre fieraj, eĉ aroganta, se ne ankaŭ impertinenta.

Tia, do, estis Smirna (Σμύρνα), la reĝidino, filino de tiu Tiaso. Ŝi estis ja tre bela, tiom, ke ŝi fanfaronis, eĉ ŝi ne hezitis kompari sin kun Afrodita (Αφροδίτη) mem, la granda diino de la belo kaj amo.

Smirna montris neniun intereson pri la plenumado de siaj adordevoj, de siaj ritaj farotaĵoj ŝuldataj al la diino. Ŝi ne vizitis ties templojn, ŝi ne organizis la decajn ceremoniojn, sanktoferojn k.c., ŝi montris ofendan indiferentecon por la granda diino.

Estas sciate, ke Afrodita, estante tute certa ke ŝi ofertas al la homoj la plej grandan bonaĵon, la amon, sciante kiom altan servon ŝi ofertas instruante al la mortemuloj la amorarton, flegante la eroton, estis tre severa, malmolestista, nepardonema. Ŝi postulis de la homoj, precipe de la virinoj, eĉ de la pli belaj virinoj, ke ili tute respektu kaj honoru ŝin. Ŝi postulis ke ili respektoplene ple-numu siajn devojn en la sanktaj lokoj dediĉitaj al ŝi.

La diino amis kaj protektis siajn adorfidelulojn, sed senindulge punis tiujn, kiuj montris al ŝi malrespekton aŭ indiferentecon. Tial, la aroganta Smirna ne evitis la dian punon, kaj tio estis, ke la diino estigis en ŝia menso profanan, kontraŭnaturan amorpasion al ŝia propra patro.

En stato de ne evidenta freneziĝo, la junulino, per tre bona travestado kaj maskiĝado, sukcesis, helpe de servistino, trompi sian patron kaj eniĝi dek du sinsekvajn noktojn en lian liton. Tuj poste ŝi rekonsciiĝis, sed ŝi estis jam graveda.



Post nelonge, la reĝo rimarkis la staton de sia solfilino, li persiste ekzamenis la aferon, li eksciis la teruran veron kaj, preskaŭ freneza pro senbrida indigno, klopodis mortigi ŝin.

Smirna sukcesis eskapi de la palaco, ŝi forkuris en najbaran arbaron kaj tie, konsumite falis, genuiĝis kaj laŭtvoĉe petegis la diojn savi ŝian infanon. Kiam la soldatoj de la reĝo alproksimiĝis, dia volo intervenis kaj tuj Smirna transformiĝis en arbon. Oni diras, ke tiele ekkreskis la bonodora planto smirna, konata ankaŭ kiel balzamarbo!

Post kelkaj monatoj, apro, probable sendita de dioj, batis per siaj dentegoj la arbon kaj ĝi disfendis ties trunkon, el kiu eliĝis treege bela bebo, Adoniso!

Kompreneble, Afrodita estis la unua kiu kuris kaj prenis en siaj brakoj la mirinde belan infanon, tamen, ĉar ŝiaj okupoj ne permesis al ŝi bone prizorgi ĝin, ŝi alvokis Persefonan (Περσεφόνη), la diinon reĝinon de Hadeso (Αΐδης), kaj konfidis al ŝi la bebon.

Post tempo, kiam la knabo grandiĝis, Afrodita petis de Persefona redoni al ŝi la junulon, tamen Persefona neis, ŝi ne volis plenumi ilian konsenton. Kompreneble sekvis kverelo kaj disputo, kiu iĝus perforta batalo, se ne intervenus la reĝo de la dioj, Zeŭso (Ζεύς) mem. La granda dio, bone sciante la eksplodan karakteron de la unua kaj ankaŭ la serenajn, sed firman, neŝanceleblan obstinon de la alia, alvokis siajn du filinojn kaj minacante ilin per punoj severaj, devigis ilin akcepti lian decidon. Tiel, laŭ la ordono





de Zeŭso, Adoniso restus kvar monatojn jare ĉe Persefona, kvar monatojn kun Afrodita kaj kvar monatojn ie ajn li preferus.

Kompreneble, la bela junulo, jam enamiĝinta al Afrodita, preferis esti kiel eble plej longe kun sia dia amoro, kiu oferis jam al li la plej ekstreman plezuron kaj feliĉon, kiun povus deziri ĉiu viro.

En tiu ĉi punkto mi devas interrompi la rakontadon, por memori, ke tia am-rilato ne estas stranga, ĉar la senmortaj dioj ne maljuniĝas, ili restas por ĉiam en la aĝo kiun ili preferas, do Afrodita estas ĉiam juna, freŝa, belega!

Nu, la splenda diino, arde enamiĝinta al la belulo, forlasis sian restadejon sur Olimpo (Όλυμπος) malatentis ĉiujn siajn okupojn, kaj, kvazaŭ ordinara mor-temulino, sekvdas sian amanton ĉien kien li iris.

Adoniso, en sia plena vicleco kaj forto, plena je viveco, avide ĝuadis sian amaron, sed ankaŭ la liberan naturon, kiun li multe ŝatis, kaj en kiu li deziris kaj kutimis longe vagadi, precipe sin okupante pri la ĉasado.

Ĉio fluis glate, ĝis kiam Areso (Άρης), la terura dio de la milito, ĉefa amoranto de Afrodita, atentis ties nenormalan algluiĝon al ŝia nova amanto, li ĵaluzis, li ekkoleris kaj, krude kaj draste, kiel li kutimis, donis definitivon solvon al sia problemo. Li sendis tre sovaĝan, grandan apron, kiu, subite, neatendite, atakis la ĉasantan Adonison, forte batis kaj trapikis lin per siaj teruraj den-tegoj, lin mortigis!

La tragedio okazis en la ĉeesto de Afrodita, kiu ne povis preventi la malbonon.

Neeltenante tian doloron, ŝi brakumis la senvivan sian amanton kaj komencis lamentadi tiele, ke la tuta tero forte kaj longe skuiĝis.

Oni diras, ke tie, kie fluis la sango de Adoniso, ekkreskis la unuaj rozoj, kaj tie, kie gutis la larmoj de Afrodita, ekkreskis la unuaj anemonoj!

La lamentado de Afrodita estis senfina. Ŝiaj plorkrioj, ŝiaj senfinaj veoj kovris la teron per funebra mallumo. La homoj, la dioj, la bestoj, la birdoj, ĉio vivanta ĉesis enamiĝi, sekskuniĝi, ĝoji, amuziĝi, ĉar la diino ne plu povis plenumi siajn taskojn. Tamen, mondo sen priatendado, kontrolado kaj regado de la amaj kaj amoraj aferoj ne povas esti. Krome, tia bela amhistorio, ne povus havi tian dolorigan finon.

Adoniso estis jam porĉiame en la malluma subtera mondo, inter la mortintoj kaj la naturo iom-post-iome perdis sian freŝecon, velkadis. Nur Persefona, la reĝino de Hadeso, povis ion fari, kaj jes, la bonkora diino, kiu amis Adonison kiel sian filon, kaj estis emociita de la neeltenebla doloro de Afrodita, petegis sian edzon, Plutonon (Πλούτων), la reĝon de Hadeso, kiu, cedante al la petoj kaj larmoj de sia amata edzino, permesis al Adoniso reveni en la vivon. La dio permesis al li resti sur la tero ses monatojn ĉiujare kaj reiri en la suban mondon, kie li restis dum la cetera jaro.

Kiom longe Adoniso estas en la luma mondo, kiom longe la bela junulo kuniĝas feliĉe kun la diino de la amo, regas printempo kaj regas somero kaj ĉio sur la tero kreskas, verdiĝas, floras, festas. Kiam Adoniso adiaŭas sian amantinon kaj foriras al la monto de la mortintoj, iĝas aŭtuno kaj iĝas vintro, kaj ĉio sekiĝas, velkas, silentas.


Estas pro tio, ke Adoniso iĝis dio, ankoraŭ unu dio de la natura kreskado, de la reviviĝo de la tero. Li estas la plej bela dio, kompreneble li estas la dio, ĉefe amata de la hetajroj, sed ankaŭ de ĉiuj ceteraj virinoj, kiuj, en la malnovaj tempoj aranĝis ĉiujare solenajn festojn honore al li.

Ĉu unu ankoraŭ bela amhistorio? Jes, tamen, ankaŭ unu certa pruvo, ke la amo ĉiam kaj ĉion, eĉ la morton, venkas!

el "GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO"

verkis **Spiros Sarfian**, el Grekujo

8 >>>



ankaŭ al aliaj personoj, kiuj preparas sin esplori la Esperantan literaturon. Tial mi klopodis forviŝi el ĝi kelkajn tro personajn komentojn kaj aldoni pli da neŭtralaj informoj. Nun mi havas komentitan legoliston, kiu ampleksas 60 paĝojn A4 (kune kun fotoportretoj). Mi pretas disponigi ĝin por "lernu!" aŭ

"edukado.net" aŭ alia paĝaro, laŭpete.

Mirejo: Kara Luiza! Vi faris elstaran laboron, kiu nepre utilis por aliaj personoj, kiuj volas eniri iom post iom en niajn trezorojn! Mi petas vin sendi al mi vian liston; ni volonte aperigos ĝin en nia paĝaro www.ilei.info.

Fonto: **ILEI - IPR Revuo 2017-2**

D EK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

Luiza verkis eseon, rande de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas. La komenco de ĉi tiu rakonto aperis en IPR 2016 2, 2016 4 kaj 2017 2 kun komentoj de Mireille Grosjean kaj reagoj de la aŭtorino en dialoga formo.

Kvara (fina) parto

Luiza: KIEL MI KONATIĜIS KUN LA ORIGINALA



LITERATURO EN ESPERANTO

La malkovro de ĝia ekzisto perpleksigis min en 2005. Precipe por esplori ĝin, mi decidis tiam dediĉi la necesan tempon kaj energion lernante Esperanton. Mi rememoras, ke mi havis

ankaŭ iom da intereso koncerne la funkciadon de la lingvo mem, sed tiu ĉi supraĵa scivolo preskaŭ elĉerpiĝis post nur kelkaj semajnoj de lernado. Plibonigi la mondon pere de lingvo en 2005... ŝajnis al mi nenio pli ol kortuŝa naiveco. Malgraŭ tio, miaj unuaj kontaktoj kun la uzantoj de Esperanto vekis mian intereson pri la Movado kaj samtempe plifortigis mian intereson pri la kulturo de tiu komunumo. Mi iel enmergiĝis en la komunumon kaj ĝian kulturon samtempe.

En la sekvaj alineoj, mi rakontos pri la maniero laŭ kiu mi konatiĝis kun la originala literaturo de Esperanto. Miaj spertoj povos ŝajni tro personaj. Sed mi opinias, ke "tipaj spertoj" pri Esperanta literaturo... simple ne ekzistas. Ĉar legado de originala Esperanta literaturo ne estas deviga en ajna lernejo, la esperantistoj legas plej ofte laŭhazarda aŭ laŭ la rekomendoj de geamikoj, kiuj mem elektis siajn legaĵojn pli-malpli laŭhazarda. Mi ne kritikis tion. Multaj homoj inklinas malŝati dum sia tuta vivo ion ajn kion oni altrudis al ili dum la infaneco... Do iufanke eble estas bone, ke fronte al la Esperanta literaturo oni sentas sin tute libera elekti. Sed tia hazarda legado havas ankaŭ malbonajn flankojn. I.a. oni povas seniluziĝi post la legado de 2-3 libroj kaj perdi definitive la intereson pri tiu grava kultura fenomeno...

Miaj unuaj kontaktoj kun la originala literaturo de

Esperanto okazis per interreto, dum la unuaj semajnoj de lernado. En la komenco, la programo "lernu!" proponis al mi legi po unu proverbon ĉiutage, poste ankaŭ po unu ŝercon ĉiutage. Iom post iom mi pliiĝis la nombron de proverboj kaj ŝercoj, kiujn mi legis ĉiutage. Mi konsideras la proverbaron de ZAMENHOF valora originala literaturo, ĉar ne temas pri nuraj tradukoj, sed pri artecaj adaptoj. Koncerne ŝercojn, mi konsideras folkloran literaturo ajnan kolekton de ŝercoj en ajna lingvo. Tiuj facilaj legaĵoj donis al mi ekde komence la fortan senton, ke la Esperanta literaturo tute ne estas "senradika", sed "plur-radika".

Tuj post kiam mi finis la kurseton "Bildoj kaj demandoj", mi komencis legi la novelaron "Vere kaj fantazie" de Claude PIRON. (Oni povas konsideri ĝin moderna "plur-folkloro" rakontaro.) Ĝi estas inkluzivita en la bibliotekon de la programo "lernu!", do mi povis legi ĝin aŭskultante la koncernajn sondosierojn kaj uzante laŭbezone la traduksistemon de "lernu!". Intertempe, miaj novaj geamikoj donacis aŭ pruntedonis al mi amason da revuoj kaj libroj, por kuraĝigi min pri legado. Inter la printempo de 2006 kaj la printempo de 2007, mi faris per interreto la internacian kurson de Boris KOLKER, laŭ lia libro "Vojaĝo en Esperanto-lando". Ĝi estis por mi bonega sperto, kiun mi tutkore rekomendas al aliuloj. Pere de tiu kurso mi komencis orientiĝi en la buntaj direktoj de la Esperanta kulturo. Post la fino de la kurso mem, mi trastudis atente la indekson de nomoj, kiun la aŭtoro aldonis al sia libro. Mi trovis en tiu laŭalfabeta indekso ne malpli ol 88 nomojn de aŭtoroj pri originala literaturo en Esperanto. Mi faris apartan liston pri tiuj aŭtoroj kaj dum la sekvaj 7 jaroj organizis miajn legaĵojn precipe laŭ tiu listo (kvankam kompreneble, mi esploris ankaŭ ekster tiu listo iomete). De kelkaj aŭtoroj mi legis nur kelkajn paĝojn, de aliaj eĉ 5-6 librojn, laŭ cirkonstancoj. Iom post iom, la listo de 88 aŭtoroj aliformiĝis en memorhelpilon pri la originalaj Esperantaj beletraĵoj, kiujn mi legis. La laŭalfabeta aranĝo de tiu listo ne plu kontentigis min. Ankaŭ kronologia aranĝo laŭ la naskiĝjaroj de la aŭtoroj ne kontentigis min. Mi elpensis kronologian aranĝon komenciĝi- antan per la jaro 1887 kaj daŭrantan laŭ la esperantistiĝ-jaro de ĉiu aŭtoro. En la finan version, mi enmetis inter krampojn ankaŭ la jarojn de naskiĝoj (kaj eventuale de forpaso), tiel ke oni povu sekvi kaj la "ondojn de Esperanto" kaj tiujn de la generacioj, por havi kiel eble pli akuratan spegulon de la evoluo de tiu fascina kaj unika kultura fenomeno. Ekde la fino de 2012, mi komencis pensi, ke tiu ĉi verketo povus utili

>>> 7

Elian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartaikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : <http://katalogo.uea.org/?inf=9437>

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957. Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

PASERO (rakonto n° 105 p. 162-166)



La pasero estas, probable, la plej konata el la birdoj. Birdo «socia», ĝia vivado okazas sub niaj okuloj, kaj, tamen, ĝi restas por ni

nekonata, ĉar kvankam ĝi sekvis la homojn ĉu en urbojn ĉu en vilaĝojn, ĝi ne konsentas sin senvualigi.

Estis dirata pri ĝi, ke ĝi estas glutema, spite, blekema, malĉastema, rabema, babilema, aŭdacema, malcedema, sensinĝena kaj ofendema, pelata de senĉesa bezono spiti kaj eĉ mistifiki. Tiuj estas ja kvalifikoj faritaj analoge kun ni homoj, kaj ni perdas le ĉefan, taksante ilin tiaj.

En la realo, por ĝin bone kompreni, necesas, antaŭ ĉio, scii ĝian situacion korpan, kio klarigas ties vigecon, ties rapidecon, kaj tio, kio povas esti komprenata kiel petolemecon. Tiel estas dirata, ke ĝi estas glutema kaj manĝema. Sed tiu voremo, kiu pelas ĝin al ekŝteli ĝis ĉe niaj piedoj la panerojn kun malrespektema familiareco, al, en la publikajn parkoj, sin lasi delogi de tiuj, kiuj kutimas provizi ilin per manĝo, kompreniĝas per la donitaĵoj propraj al ĝia spiraparato. Ĝi spiras po cent fojoj en minuto, dum kokino spiras po nur dek du fojoj. Tiu spirrapideco respondas ĉe li al korpa brulado. La pasero «brulas» ene kiel malgranda ardaĵo, kaj, pro tio, konsumas

multajn vivmaterialojn. Ĝi laŭlitere voras sin, kaj por pluesti estas devigata senĉese fueli la fornon de tiu profunde biologie kialita forno. Tial tiu rapideco spira kaj samtempe kora, faras ĝin tre sendefenda kontraŭ toksaĵoj. Ĝi bezonas vivi en aero ne malpura, kaj se li kapablas plu vivi en niaj urbegoj, tio estas nur, ĉar ĝi trovas tie pli facile sian manĝon, kaj ĉar ĝi kapablis adaptiĝi. La ministoj uzas ĝin por detekti karbonan monooksidon, malleviĝante kun ĝi, en kaĝo, en la fundon de siaj galerioj, kiel alarmsensilon. Ĝi ofte pereas pro tiu ofero, trudita al ĝi.

....

Mi bredis unu, kiu estis tre longtempe mia ĉiutaga kunulo. Mi estis ĝin trovinta en la pariza ĝardeno de Luksenburgio, falinta el sia nesto, kaj estis ĝin kunportinta. Ĝi lasis sin malsovaĝigi tre facile, kaj reagis kiam vokita per ĝia nomo. Mi kunportis ĝin ĉien, en mia poŝo, kie ĝi ne movis; fojfoje, kiam ĝi estis laciĝinta, ĝi eligis du-tri mallongajn vokojn. Iam, kiam mi estis veturanta en la metroo, kaj ne povis ĝin liberigi, ĝi ribelis, ŝprucis el la poŝo de mia palto, kaj ekflugetadis, kaŭzante grandan ĝojon ĉe la kunvojaĝantoj. Ĝi revenis post kelkaj momentoj sin deflugi sur mian ŝultron, poste reeniris sian ĉelon.⁽¹⁾

Strikte obeema, ĝi kolektadis plumon aŭ pinglon, kaj alportis ĝin al mi. Flugante ien tien, libere, ĝi sidadis sur la kornicon de la kameno, kaj ekvokadis min per la pepado, kiun ĝi direktis al mi. Se mi prenadis libron, ĝi tuj mutiĝadis, kaj promenadis seriozmiene tra la ĉambro. Foje la knaradon de mia skribplumo ĉuigadis ĝin; tiam, ĝi deflugadis sur mian tablon, klinadis la kapon maldekstre, dekstre, sekvalidis la skribomovon, saltetante sekve al mia mano, kaj finfine pinĉadis la fontoplumon per la beko tirante flanken por malhelpi min pluskribi.

Ĝi estis maltimema kaj decidema. Ĝi vivadis en bonaj rilatoj kun la hundo kaj la kato de la domo; ĝi sidadis sur iliajn dorsojn, ilin beketis, kaj direktis al ili solidajn bekfrapojn por ilin kvietigi.

La kato uzadis ĝin kiel ludilo, kaj ĝi faradis same, kaj mi ofte trovis la paseron, kapon sub la flugilo, dormanta inter la kruoj de de sia amiko, kiu ronronadis pro feliĉo. Kiam ili ne vidis unu la alian, ili serĉadis reciproke tra la domo, kaj vokadis unu la alian per siaj blekoj, ĝisgrade ke iam, kiam la pasero estis kaŝiĝinta en nealireblan lokon, nur la miaŭoj de la kato povis ĝin revenigi.

Certan jaron ĝi daŭre restis netrovebla; ĉar ĝi estis



flugetinta al la najbaraj tegmentoj, mi kredis, ke ĝi estis min forgesinta, kaj neniam revenos. Ĝi revenis post kvar monatoj, kun kvar el siaj idoj, kiujn ĝi prezentis kiel atesto de fideleco. Ĝia inbirdo, maltrankvila, atendis pri ĝi sur la defluilo, pepante. Ĝi returnis al ŝi, kun sia idaro, kaj foriris.

Danke al ĝi mi lernis la lingvon paseron, kiun oni povas sekvi per la diversaj tonoj de ilia voĉo. Ili havas apartan blekon por admoni siajn birdinon kaj idojn esti mutaj dum proksimiĝas rabobirdo; ili havas alian por ekflugi, por peti nutradon, por diri sian ĝojon aŭ sian doloron, por inviti samspecianojn veni kaj kunmanĝi riĉfonton, kiun ili trovis. Mia pasero nuancadis sian parolon, se tiel diri eblas, kiam ĝi direktiĝadis al mi, ebla pro tio, ke mi ne estis pasero, ĉar poste,

direktante mian oreton al la «parolo» de aliaj siaj samgentianoj, al kiuj mi kutimiĝis, mi konstatis, ke mi bone sekvis tion, kion ili diradis al mi, sed ke iliaj arioj estis malpli modulaciaj kaj pli akraj. Certe estis en la tonoj de mia pasero tiu tenereco, kiun ni metas en niaj, kiam ni amas iun.

sendis **Roland Platteau**, el Francio

(1) Tiu poŝo estis lia plaj ŝatata «hejmo». Iam, por ĝin inciteti, mi estis fermkudrinta ties eniron, per tri-kvar kudreroj; ĝi malfaris ilin furioze, unu post unu, per la pinto de sia beko, kun rimarkinda lerteco.

ROZO

tradukis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

Rakonto de
VLADIMIR JĔLEV - OVĈAROV, BULGARIO
el la libro "Rozata"

Al Tanja Nafka kaj Marat Baŝarov

Tio estis interesa multetapa konkurso. Oni organizis ĝin unua foje – arta glitado kun glitiloj sur glacio pri dancaj paroj. Unu el la partneroj, profesia glitisto kaj la alia – antaŭ tio ne estis glitinta per glitiloj kaj speciale prepariĝis por partopreno en la konkurso. La intereso estis eksterordinara. La reklamo diris sian vorton – "Steloj sur glacio". La salono ĉiam estis plenplena.

Je la glaciplaco staris la paro favorato de la publiko. Ŝi – profesia glitistino, li – juna entuziasma aktoro, malmulte aventuristo. Ĵus ili gajnis sian laŭvican venkon kaj nun la publiko ilin aplaŭdegis. Ili staris sub la diverskoloraj lumoj de la multnombraj lumĵetiloj, ridetis feliĉe kaj afable mansvingis. Speciale multaj estis la aplaŭdoj por la paro. Pri la mallonga tempo dum kiu li sin preparis, li demonstris sukcesojn, pri kiuj povis lin envii eĉ iuj profesiaj glitistoj.

Laŭ reglamento post ĉiu prezento la artanimistoj, ankaŭ sur glitiloj, aperis je la placo kaj pridemandis la konkursantojn. Kaj ĉi - foje la artanimistino per graciaj movoj sur la glacio ekstaris antaŭ ili.

- Ĉu vi estas feliĉa? – estis ŝia unua demando al la knabino.

- Jes, kaj ni estas preskaŭ al la finalo!

- Kaj kion vi diros pri via partnero?

- Li estas eksterordinara! – kun patoso preskaŭ ekkriis ŝi, ĉirkaŭprenis kaj kisis Maraton.

- Pri kio vi pensis dum la dancado? – turnis sin la artanimistino al la juna homo.

- Sur la scenejo mi pensas nur pri tio, kion mi

ludas – respondis li sendetene.

- Al kiu vi dediĉas vian venkon?

- Ĉu mi povas rakonti iun mallongan historion?


- Kompreneble – ridetis la virino.

.....

En la koridoro oni aŭdis la paŝojn de Marat:

- Tamaraĉka, estas mi.

La juna virino, subtenante per du manoj sian grandan ventron, malrapide staris de la divano, kie ŝi kuŝetis kaj proksimiĝis al la pordo. Ĉe la sojlo ekstaris Marat, alta, buklohava kaj kiel ĉiam elradianta neelteneblan energion – tion, kion Tamara adoris en li, sed tuj ŝi ekvidis, ke lia ĉiam radianta rideto ne estas



la sama.

- Kion oni diris al vi? – demandis ŝi.

Marat brakumis ŝin, karesetis ŝiajn hararojn, kliniĝis kaj kisis ŝin.

- Kion oni diris al vi? – ripetis Tamara.

Anstataŭ respondo, li demandis, metante sian manon sur ŝia ventro kaj provis rideti:

- Kiel fartas nia bebo? Ĉu aŭskultas nin? Ĉu maltrankvilas la panjon?

- Kion oni diris al vi? – demandis ŝi tria foje kaj en ŝia voĉo eksonis kolero, sentante, ke li intence ne respondas.

Marat denove kisis ŝin, premis ŝin al si mem kaj mallaŭte diris:

- Oni min mobilizis.
- Kiam?
- Morgaŭ.

Tamara ekstremis, premis sin pli forte kontraŭ li kaj ekparolis rapide intermite:

- Ĉu vi ne diris al ili, ke mi estas graveda, ke ĉiu momente mi naskos kaj ke ni estos nur duope. Prokrastu ĝin, almenaŭ por unu monaton.

- Ne povas, kara, milito ĝi estas. Ne estas eble...- kaj denove ŝin kisis.

Tamara premis per du manoj la parapeton de la balkono kaj rigardis malsupren. La vojporo frapiĝis. Marat eliris kun sako surŝultre. Turnis sin, mansvingis kaj diris:

- Post kiam mi alvenos, mi tuj sendos al vi la adreson, por ke vi skribu al mi – ekkriis li kaj vidis la malgrandan rozujon kun granda floranta rozo. Li kliniĝis, prenis ĝin per du manoj, elradikigis ĝin kaj ĵetis ĝin alten.

- Tio estas donaco al vi duope! – mansvingis denove, returnis kaj rapide malproksimiĝis.

Tamara kaptis la rozon kaj longtempe rigardis al li ĝis kiam li malaperis.

Post kvar tagoj la najbaroj kondukis ŝin en la naskodomon. Ŝi naskis knabineton. Kiam oni ŝin demandis kiel nomos la bebon, ŝi tuj respondis:

- Rozo, kiel la rozo, kiun al ni donacis ŝia patro.

Post semajno oni ilin elhospitaligis kaj ili revenis hejmen. Ĝis kiam Tamara ankoraŭ rigardis kiu, kie estas, venis la najbarino. Ili intersalutis, interkisis sin. Ŝi laŭdis la bebon, ke ŝi estas bela kaj similas al sia patro. Poste metis sian manon en la poŝon de sia antaŭtuko:

- Vi havas leteron... Ĝi venis hieraŭ.

Tamara ekstremis:

- De Marat?

- Ne...- la virino neklare diris ion, donis al ŝi la konverteton kaj tuj eliris. Ŝi sciis kio povas esti la enhavo de tiuj konvertetoj.

Tamara disŝiris la koverton, malfermis la paperfolieton kaj eklegis. Akra korŝira kriego eliĝis el ŝiaj brustoj kaj ŝi falis sur la divano. Marat jam pereis dum la unua batalo.

La letero finis kun la kutima: "... kun la morto de la bravuloj por defendo de la Patrolando." La dato – unu tago antaŭ la nasko de Rozo...

.....

La junulo eksilentis. En la grandega salono iĝis neordinara senbruo. Ĉiuj aŭskultetis lian kortuŝan rakonton. Li prenis profunde spiron kaj malalte daŭris:

- Jen, al tiuj: al mia avo Marat, al mia avino Tamara, al mia patrino Roza, al ĉiuj homoj, dank al kiuj ni hodiaŭ vivas pace, trankvile kaj feliĉe, mi dediĉas nian venkon!

Post momenta silento la salono ektondis pro la aplaŭdoj de dudek kaj kvar miloj da manoj.

Tradukis el la bulgara **Elena Popova**

Esperanto-programo de kastelo Greziljono en 2018

Esperanto-programo de kastelo Greziljono en 2018

2018-apr-20/28 » PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek, Christophe, Marion » rete.gresillon.org/p

2018-apr-27/28 » PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj » rete.gresillon.org/p

2018-maj-09/13 » Ĥora (korusa) renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojĉeva » rete.gresillon.org/koruso

2018-maj-09/13 » ReVe, Renkontiĝo Vegana, kun prelegoj, kursoj, filmoj, koncerto de Jonny M » rete.gresillon.org/reve

Somera programo 2018 » rete.gresillon.org/somero

2018-jul-09/27 » Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo Bronŝtejn

2018-jul-09/16 » Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso » rete.gresillon.org/s1

2018-jul-15/21 » Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer » rete.gresillon.org/s0

2018-jul-16/21 » Speciala semajno kun kursoj de Esperanto kaj de la franca lingvo » rete.gresillon.org/s2

2018-jul-21/27 » Internacia E-Konferenco de OSIEK "Esperanto en Artoj" » rete.gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19 » Festa Semajno por infanoj kaj familioj » rete.gresillon.org/s4

2018-okt-26/nov-03 » AŬTUNE la Esperanto-ferioj - kun halovena festo kun Dennis Keefe

Esperanto-Kulturdomo ĉe kastelo Greziljono

reto: <http://gresillon.org/?lang=eo>

kontakto: kastelo@gresillon.org

telefono: +33-2.41.89.10.34

Novaj Esperantaj Libroj de Julian Modest

En monato marto 2018 aperis kelkaj novaj libroj de la konata Esperanto-verkisto Julian Modest, kiujn oni baldaŭ povos mendi ĉe la libroservo de UEA kaj ĉe aliaj libroservoj.



"Dancanta kun ŝarkoj" - originala novelaro, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin. La libro enhavas originalajn Esperantajn novelojn, verkitaj de Julian Modest dum la lastaj du jaro

"Enigma trezoro" - originala romano por adoleskuloj, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin.

Resumo: Kelkaj knaboj en malgranda mara urbo ekscias, ke sur insulo, antaŭ pluraj jaroj, estas kaŝita granda ora trezoro. La knaboj decidas trovi ĝin. Unu el ili tamen kaŝe de siaj amikoj navigas per ŝtelita boato al la insulo, kie estas kaptita de bando da krimuloj. Kio okazos al la knabo? La romano estas alloga kaj streĉiga.

* *Bedaŭrinde ke ni ankoraŭ ne ricevis la kovrilbildon de ĉi tiu libro*

"Averto pri murdo" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Espero", Peter Balaz, Slovakio

Resumo: Damjan Donev, talenta inĝeniero, fraŭlo, subite malaperas, sen postlasi signon. Lia poŝtelefono ĉesas funkcii. Lia nevo, Bojan, estas ŝokita kaj petas la privatan detektivon Janko Sinapov ekscii kio okazis al la onklo. Post longaj kaj streĉaj esploroj la detektivo komprenas, ke iuj planas murdi la inĝenieron kaj tial li kaŝas sin. Tamen kiu aŭ kiu deziras murdi Donev kaj kial?



"Murdo en la parko" - originala krimromano, eld.:

Eldonejo "Libero", Lode van de Velde, Belgio.

Resumo: En pluva vespero en parko, proksime al ŝia hejmo, estas mortpafita la juna ĵurnalistino Maria Kirilova.

La murdo, tute nekomprenebla kaj mistera, vekas plurajn demandojn. La ĵurnalistino ne havis malamikojn. La polica komisaro Pavel Silikov komencas pridemandi konatojn kaj kolegojn de Maria por trovi la murdiston, sed subite la polico trovas murditan Dako Penev, la murdisto de Maria. La mistero pligrandiĝas. Kial Maria estis pafmurdita kaj kiu deziris ŝian morton?



Julian Modest (Georgi Miĥalkov) naskiĝis la 21-an de majo 1952 en Sofio. Bulgario. En 1977 li finis bulgaran filologion en la Sofia Universitato Sankta Kliment Ohridski, kie en 1973 li komencis lerni Esperanton. Jam dum la universitatataj studoj li aperigis Esperantajn artikolojn kaj poemojn en revuo *Bulgara Esperantisto*. De 1977 ĝis 1985 li loĝis en Budapeŝto, kie li edziĝis al hungara esperantistino. Tie aperis liaj unuaj Esperantaj noveloj. Ĝis nun aperis dudeko da liaj libroj en Esperanto.

Julian Modest pli ŝatas modestajn, ordinarajn vivojn kaj neordinarecon en ili, kiun nur li vidas, ĉar li observas la aferojn siamaniere. Tiel en la noveloj *Dankesprimio*, *Du biletoj por teatro*, *Kristnaska kafo* kaj *Patrino* la aŭtoro rakontas pri malgrandaj faroj, kiuj ŝanĝis ies vivon kaj kiujn oni ne forgesas, ĉar temas pri iaspecaj destinaj okazaĵoj. La plej granda nombro da noveloj montras bonan konon pri la homaj psikologio kaj animo, eĉ se temas je iaspeca hiperboleca, fantazia okazaĵo, kiel en la novelo kies titolo donis la titolon al la libro mem – *Dancanta kun ŝarkoj*.


de **Zdravko Seleš** en la postparolo al la novelaro *Dancanta kun ŝarkoj*

Fonto: Revuo **KRESKO** #4 - marto 2018

"La Vinberoj de Kolero" de John Steinbeck

"La vinberoj de kolero" - la origina titolo estas "The Grapes of Wrath" - eble estas la plej fama libro de John Steinbeck, usona verkisto kiu gajnis Nobelpremion de literaturo en la jaro 1962.

Mi tralegis ĉi tiun libron kiam mi estis 18 aĝa. Ĝi al mi tre plaĉis pro ĝia elvokiva forto kaj pro ĝia samtempeca aktualeco.



RECENZO

Kelkaj kamparanaj familioj, kiuj vivis ĉiam indece (kvankam ege modeste) per profitoj enspezitaj el produktoj de la tero kultivata, abrupte falas en mizero, pro la alveno de la Granda Depresio.

Fakte, ankaŭ pro la komplikeco de arida klimato kaj pro la pruntrefuzo de la bankoj al la duonfarmuloj, plurnacia koncerno provas profiti el spekulacio sur la tero; kaj kiel fina rezulto la terkultivistoj estos elpelataj de ilia hejmoj.

Inter ĉiuj familioj, kiuj estas fordankitaj, unu estas ankaŭ niaj romanprotagonistoj, la familio Joad.


Post ke ili estas senigitaj de ilia terpeceto plugebla, al ili ne restas alia afero farebla ol formoviĝi de tie. Sed kien? La unika ŝanco ŝajnas esti tiu jam postkurita de miloj da aliaj personoj kiuj, antaŭe ili, perdis ĉiun rimedon por vivi.

La ŝanco por ĉiuj, tiuj senesperuloj, kiuj havas plu nenion, estas la sama: Kalifornio, unu ŝtato kie /oni diras/ la tero estas tre fekunda, riĉa je oranĝarbejoj kaj blankaj dometoj; krome, oni fabelumas, ke tie la tero estas tiel abunda, ke estos donacata al tiuj, kiuj deziras kultivi ĝin.

Do, ankaŭ la protagonistoj kunigos al la homa transmigrado, kredante senespere en ekzisto de la mita Eldorado, okcidenten. Ilia kredo apogita nure de reklama flugfolio legado, kiu garantias ĉi tiun promeson, vorton post vorto. Sendube tio estas malmulte, kaj ili tion komprenas antaŭ foriri el Oklahomo, tamen tio estas pli bone ol nenio. Nun jam ili ne havas hejmon sub la kapoj nek panon por la stomako. La espero estas la nura loko kie ili vivos kaj la nura nutraĵo per kio eblos vivi. Se ili seniĝus je la pli bona morgaŭo, kio okazus al ĉiuj de ili, kaj granduloj

kaj malgranduloj?

Tiel, post ili kunigas ilian malmultajn aĵojn sur malnovegan kamionon, la nura riĉeco restanta al la familio, ili decidas foriri.



La kamiono kun eta benzinprovizo kaj kun malbonegaj pneŭmatikoj pene moviĝante malantaŭ multaj aliaj, viciĝas sur interŝtata vojo sesdekse kun ĝia ŝarĝo de homoj kaj aferoj.

Krom la patro, la patrino, kaj la tri grandaj filoj (Tom apenaŭ eliranta el malliberejo; Al kaj Noé), ĉi tie ni trovas amasigitajn la du ĝemelojn kiuj estas sep aŭ ok aĝaj, la junan filinon gravedan (RozoTea) kaj ŝian edzon, la onklon John, sufiĉe maljunan; la du maljunajn geavojn kaj finfine Casy, amiko de Tom, kiu partoprenas al la ekspedicio.

La vojaĝo daŭrigas inter funebroj, rezignoj, teruraj neantaŭvidaĵoj kaj esperoj akurate seniluziigintaj.

La protagonistoj, dum la vojo, eksperimentas la vastan spektron de la negativaj sentoj: la timon, la solecon, la doloron, la apation.

Sur la bazo de ĉi tiu "renversita piramido", ĉar la esperata malsuriro estos katastrofa, regos ĉiam la izoliĝ kaj la nefidemo.

Komence la anoj de la familio estos markitaj kiel fremduloj, poste ili estos kulpigitaj ŝteli la laboron de aliaj, finfine ili estos akuzitaj esti krimuloj kaj strikrompantoj.

Ĝis la fino de la vojaĝo elĉerpa, kaj fizike kaj psikologie por ĉiu persono, la kalifornia Eldorado montros sian veran tromplogan vizaĝon.

La fino, kiun mi ne rivelos por ne ruinigi la surprizon al neniuj, finiĝas neantaŭvideble. lumaniere oni havas la sensacion, ke la eterna rado de la vivo kaj de la morto estas ege pli forta ol ĉia homara doloro.

La aŭtoro eklipsiĝas de rakonto. Lian voĉon oni sentas neniam. Li ne intervenas por skurĝi kelkajn sintenojn aŭ por kompati la perfortadojn. Li lasas la faktojn paroli en ilia kompleteco. Li ne moderigas la rakonton pri la mankoj, nek tamen li forgesas priskribi kelkajn fratajn sentojn en la afliktiĝo aŭ la naturbeleco, kiuj portas konsolojn.

La verkadstilo de Steinbeck estas tre flua, sub la ŝildo de la mallongaj periodoj kaj de la esprima koncizeco. Lia leksiko estas riĉa, sed neniam bombasta.

verkis Gioia Albano, el Italujo

Fonto: <https://ilconfinedelleparole.blogspot.com.tr/2012/06/la-vinberoj-de-kolero-de-john-steinbeck.html>

Rakonto de Adil Olluri, Albanujo

En nia malgranda vilaĝo, unu el plej malgrandaj, viditaj de mi iamfoje, ĉiun jaron venadis neordinaraj vendistoj el diversaj landoj de la globo. Ili apenaŭ vendadis en iu alia loko, krom en nia vilaĝo, etendiĝinta ĉe la piedoj de monteto, unu inter la plej malgrandaj, videblaj de la homa okulo. Ĉi tiu okulo neniel povas vidi ion grandiozan en ĉi tiu vilaĝo, krom la surterajn domojn kaj malvastajn stratojn, kvazaŭ porkaprajn, kie apenaŭ du virkapoj povus pasi, se ili irus flankalflanke. Tie, ne nur la domoj kaj la stratoj, sed ankaŭ la homoj estas malgrandaj, kaj la plej altstatura el ni estas ja Sali, kiu defias mian 190 cm per dek da centimetroj pli.



Eble, mi jam diris vin ke ĉi tiu vilaĝo kun la ties homoj, estis, ni diru, tute forgesita eĉ de Dio mem, estis forlasita ĉe tiu abisma angulo de la lando, kie nur rarulo, kaj fojfoje neniue, eniris, krom la vendistoj, kiuj ne similis unu al la alia.⁶

Ili vendadis sonĝojn, neordinaran varon, kiu apenaŭ vendiĝas en iu alia lando, krom ĉe ni. Neordinaraj vendistoj venadis kutime ĉiujare, je la sama tempo, je la sama semajntago, je la sesa tago de la sesa jarmonato kaj komencis sian laboron je la sesa horo de la mateno, kaj, laŭ iliaj statistikoj, dum la ses laborjaroj, ili estis vendintaj sescent sesdek sonĝojn. Ilian merkaton ili nomis foiro, vorto ne aŭdita antaŭe en nia vilaĝo.

Estis diversaj sonĝoj en ĉi tiu foiro, el plej malmultekostaj ĝis tiujn plej multekostaj, kiuj, se oni aĉetus laŭvole, post iom da tempo realiĝis.

Nur malmulte da tiaj sonĝoj, tre malmulte, ne estiĝis, sed la aĉetintoj rajtis ilin anstataŭi per aliaj sonĝoj, ĉar la fremdaj vendistoj respektis la laborkriterion por ne redoni la monon, tial la vilaĝanoj obeis al ili. Niaj homoj aĉetadis sonĝojn el plej

strangaj ĝis tiuj, kiujn oni apenaŭ indus mencii. Ili aĉetis sonĝojn koncernantaj sin mem sed ankaŭ la alies vivon. Ili revis pri sia amo, sed ankaŭ pri la rompiĝo de la alies amo, revis pri sia riĉaĝo, sed ankaŭ pri la pereigo de la alies riĉaĝo.



Mi memoras ke Selim, antaŭ kelkaj jaroj, aĉetis sonĝon por divorcigi Arsim kun Besarta kaj, post ses monatoj, la geparo disiĝis, kaj la sama Selim, post unu jaro, aĉetis la sonĝon por proprietiigi al si tiun virinon, kio ja realiĝis. Simile, mi memoras ke Hamdi aĉetis sonĝon, laŭ kiu la riĉaĝo de Fazli ne plu kresku kaj, ekde tiu tago, ĉi lasta apenaŭ prosperis en sia metio.

La sonĝoj pri la aliuloj kostis pli malkare kaj niaj vilaĝanoj, estante malriĉaj, aĉetadis ilin pli ofte. Kaj, iamtage, kiam proksimiĝis la denova alveno de la vendistoj en kutima tempo, la vilaĝanoj enzorgiĝis pro tio, kiajn sonĝojn ili devus aĉeti ĉijare, ĉar multaj jam esprimataj sonĝoj, aŭ eĉ enfermitaj en ilia animo, estis jam aĉetitaj de ili.

Kion ni aĉetu, kio plurestis ankoraŭ ne realigita; ĉu ni aĉetu, aŭ ne, ĉi jare...!? Jen iliaj maltrankvilaĝoj, kiuj lasis ilin senmanĝe kaj sendorme, ĉar ili ne povis solvi tiun dilemon.

Tia maltrankvilaĝo "aĉeti, aŭ ne aĉeti" ne malŝparis eĉ min, nek du miajn plej bonajn amikojn, Ali kaj Sali.

Tutan tagon nin elokupis la pensoj pri tio, kion ni faru, ĝiskiam Sali, kiu estis je dek centimetroj pli alta ol mi, decidis alparoli min.

- Ĉu ni aĉetu sonĝon kiu apartenus al ni ĉiuj kaj samtempe al ĉiu el ni aparte?!

- Kiel tio eblus? -demandis mi heziteme.

- Nu, kiel mi diru...Ŝajnas kvazaŭ...

- Diru do, kiel? - insistis Ali

- Ni demandu ke oni vendu al ni sonĝon, laŭ kiu niaj korpoj pligrandiĝos.

- Oouuuu! - ekmiris Ali

- Jam sufiĉe longe ni vivis malgrandkorpulaj. Ni ne devas esti alie ol la ceteraj homoj, kiam ni povas estis ja same kiel ili. Hodiaŭ ekzistas ebleco por tio. Nun, aŭ neniam! - diris Sali kun tono ribelema, kiun mi neniam antaŭe estis aŭskultinta.

Ĉiuj ni tri entreprenis kaj dividis la taskojn por konvinki la vilaĝanojn ke ĉi tiu sonĝo estas ja la plej bona kaj la plej valora, ĝi estas do aĉetinda.

Komence, oni atendis nin dubeme, estis eĉ tiuj, kiuj cerbumadis ĉu tio povus okazi aŭ ne, ĉu ni povus esti tiel altstaturaj kiel la ceteraj mondanoj. Sed, pli da problemoj ol kun tiuj jam supozitaj, ni havis kun tiuj, kiuj, kontraŭstarantaj anticipe, frapis siajn vortojn al

nia vizaĝo. "Ne, ni ne volas esti kiel la tuta mondo, kian bezonon ni havas por esti altstatura", diris klare Djemšid, la primaro de la kvartalo de Kadrioj.

Plej grandan malfacilaĵon por konvinki ni havis kun la virinoj, ĉar ili, estante serviziaj, kredis ke tiu ĉi sonĝo kreskigus nur la virajn korpojn kaj ne ankaŭ la siajn korpojn, tiel povrulinaj timis ke la korpe pligrandiĝintaj viroj forlasus ilin kaj forkuris post la virinoj de la aliaj vilaĝoj kaj urboj. La plej kontestanta inter ili estis Hajrie, kiu, kiel oni parolis en la vilaĝo, estis dirinta al la virinoj ke neniel ili permesu al iliaj viroj faru tion, kiel estis aŭdinta la mizerulino, ke, pligrandiĝinte la vira korpo, la ties seksorgano malpligrandiĝus. Ĝi eĉ "povus reduktiĝi al ia veruko", oni diris ke Hajrie estis rakontinta al la virinoj en iu ties kunveno. Ŝi neniel povus antaŭpensi ke Feriz, sia edzo, havu grandan korpon kaj etan seksorganon, ĝiskiam ŝi eksciis de sia edzo ke ĉi lasta estis interkonsentinta kun la aliaj viroj ke oni postulu de la vendistoj ke la pligrandiĝado iru paralele, korpe kaj seksorgane.

Estis tre malfacile konvinki ĉiujn vilaĝanojn, sed, danke al multaj klopodoj, la celo estis akirita kaj iutage, antaŭ ol alveni la vendistoj envorte, ĉiuj ni estis pretprete unupensaj. Ni interkonsentis ke morgaŭ matene ĉiuj, viroj kaj virinoj, kune eliru, iom antaŭ la sesa horo matene al la vendejo de Dema, kie la

vendistoj kutime haltis kaj ĝuste dek minutojn antaŭ la sesa horo, kiam la luno sin definitive kaŝis en sia rifuĝejo kaj la suno, moligita pro la dormo, eksalutadis malvarme per siaj radioj.

Ni ekrimarkis la vendistojn de la sonĝoj alvenante, kiuj certe devus esti surprizitaj vidante nin ĉiujn kune. Ni estis envicigitaj kvazaŭ en batalionoj en tiu matena aŭroro, ĝis tiu grado ke, se nin ekrigardus nekonatulo tielaspekte, li ekspensus ke baldaŭ startus mezepoka batalo per glavoj inter du flankoj. Alproksimiĝinte kaj intersalutinte, kelkiu el ni diris ilin ke ĉijare ni ĉiuj deziras nur unu sonĝon, kaj mi kun miaj amikoj eksplicis al ili pri kio temis.

"Ni ne vendas tian sonĝon", rezonadis unu el la plej maljunaj vendistoj. Sed la vilaĝanoj protestis, mallaŭdis kaj alkriis vendistojn, ĝiskiam ĉi lastaj kvietigis ilin dirante ke, post kelkaj tagoj, ili revenos kun la sonĝo envorte subaksele. La vilaĝanoj atendis ilin la morgaŭon kaj la postmorgaŭon, longajn horojn, atendis semajnon kaj eĉ du semajnon pli, sed la vendistoj ne alvenis. Ni pensis ke eble ili venus la venontan jaron kaj ni atendis ilin en la kutima tempo, sed apenaŭ ni rimarkis iun ties spuron. Ni atendis eĉ post du kaj tri jaroj, sed ili ne alvenis plu.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

La Karnavalo en Ŝalono ĉe Saono

KARNAVALO en Ŝalono ĉe Saono Francio en la jaro 2011

En la jaro 2011 la karnavalo en Ŝalono ĉe Saono (Chalons-sur-Saone) okazis dum du sekvantaj dimanĉoj tra la stratoj sub tre malvarmaj veteraj kondiĉoj. La jena artikolo estas pri la dua dimanĉo, en la 27-a de februaro en 2011.

Artikolo en ĵurnalo, titolita :

« ILI NE POVIS EVITI LA MALVARMEGON. Eĉ por GONIO tio, kio estas tro, estas tro, tamen... »

Antaŭ ricevado de la kiso de la urbestro, la reĝinoj kaj ŝiaj popoloj alfrontis la malvarmegan venton.

GONIO : Estas kostumita homo, ofte vestita en uzitaj, modestaj, flikitaj vestaĵoj. Lia vizaĝo estas kaŝita per masko. Li partoprenas en defilado por amuzi sin, lanĉas konfetojn, kaj permesas al si ĉion, kio estas malpermesata en aliaj tempoj. Ili estas loĝantoj de kvartaloj kaj geamikoj kiuj grupiĝas kaj piediras en defilado kantante, dancante, portante panelojn kun skribaĵoj pri aktualaj, politiko, tutmondaj skandaloj

sendis Jocelyne Monneret, el Francio

ktp. Tiujare ili estis 750.

Alia specialaĵo en tiu karnavalo estas la « DIKAJ KAPOJ ». Homoj faritaj el kartono kaj paperostroj gluitaj. Ili havas dikajn humorajn kapojn kiun ili surmetas sur la kapoj aŭ ilin apogas sur la ŝultroj kaj defiladas. Tiuj amuziloj estas tre pezaj kaj ofte la komitato de la karnavalo salajras homojn por kunporti la karnavalaĵojn.

REĜINOJ : Estas junulinoj elektitaj en la diversaj kvartaloj de la urbo, laŭ afableco kaj dediĉado de parto de ilia tempo al la kvartalovivo. Komence de la lasta jarcento (1920) virinoj – laboristinoj de fabrikoj voĉdonis por



elekti siajn Reĝinojn de Laboro kiuj poste prezidos en la Karnavalo de la urbo.

LA REĜO : La nomo de la reĝo de la Karnavalo ĉiam



estas « sia Moŝto KABAĈO », giganto farita el kartono. La duan dimanĉon, vespere oni bruligas lin kaj faligas lin en la riveron Saono, post juĝado. Oni legas laŭtvoĉe la verdikton de tiu juĝisto, kiu kondamnis lin. Oni riproĉas lin pro multaj misaĵoj de la tuta jarovivo kaj pro multaj eventoj okazintaj. Jen kelkaj el tiuj riproĉoj kiujn vi eble ne bone komprenos ĉar ili estas rilataj al konataj okazaĵoj en nia urbo aŭ

Ŝercoj



- Kiom kostas ĉi tiu hundo?
- Kvincent eŭrojn.
- Ĉu ĝi estas fidela?
- Kompreneble. Mi jam forvendis ĝin kvinfoje, sed ĉiufoje ĝi revenis alitage

matene.

Timemaj patroj

Du knabetoj paroladas pri tio, kies paĉjo estas pli timema.

— Se fulmas, mia paĉjo kaŝas sin sub la liton – diras la unua.

— Tio estas nenio – respondas la alia. – Se mia panjo nokte ne estas hejme, mia paĉjo dormas kun la najbarino.

En malsanulejo oni prepariĝas viron por operacio. La kirurgo diras al flegistino:

— Mi petas iom da alkoholo.

Aŭdante tiun ĉi la malsanulo eksidas sur la operacitablo:

— Sinjoro doktoro, bonvolu atendi ĝis la fino de mia operacio!

en Francio kaj multaj estas kalemburoj :

• Kaŝi ĉapeliton de la vorto franclingve urbodomo : Hôtel de ville

• Fermi ĉiujn pluvombrelojn de firmao kiu fabrikas pluvombrelojn (la fabriko bedaŭrinde maldungis la laboristojn)

• Anstatŭi la ormedalon de ŝalonana atleto premiita dum Olimpiaj Ludoj per ĉokolada medalo ŝtelita el kukofarejo de la urbestro !

• Trinki dum la jaro 2004 tiom da botelojn da vino, kiom estis trinkinta en la festo pri libereco de nia urbo en la jaro 1944 (fino de la mondmilito)


• Fermi postoficejojn ĉirkaŭe de Ŝalono ; direktivo de registaro fakte kiu diras ke ne necesas publikan oficejon.

• Kuŝi sur feloj, peltoj de la centjaraĝa vendejo en nia urbo

• Ludi keglojn kun konstruaĵoj en iu ajn kvartalo kie oni faligis intence fuŝitajn konstruaĵojn pro malnoveco.

Bedaŭrinde ke en ĉi tiu jaro mi ne kuraĝis partopreni al la karnavalo pro la malvarmego !!

Verkis kaj sendis **Jocelyne Monneret**, el Francio



Krucvortenigmo



Horizontale:

1. Reĝimo de regno, kies estro estas reĝ(in)o, imperiestr(in)o, princ(in)o ks.;

En iu tute ne difinita tempo.

2. Socipolitika idearo, strebanta al individua libereco, federisma asociiĝo kaj al forigo de ĉia subpremado, ekspluatado kaj ŝtata regado; Tiu, kiu estas karakterizata de alterno de leviĝoj kaj malleviĝoj.

3. Spacpafaĵo, uzanta fuzaĵon kiel propulsan rimedon; (inverse) Sesangula blanka floket' de kristaliĝinta akva vaporo, kiu defalas de la atmosfero.

4. (inverse) Demetaĵ' el etaj gutoj de akvo, devenanta el likviĝo (okazanta ordinare nokte aŭ matene) de vaporo sur la supraĵo de plantoj, grundo ktp en plena aero; (inverse) Ag' de io kiu havas efektivan rezulton.

5. Elementa peceto; Tut' de la ecoj kaj manifestiĝoj de tio, kio estas laŭmode eleganta, stile bongusta; Rilata aŭ apartenanta al ni.

6. Monunu' de Rumanio kaj Moldavio; Nomo de la cifero 3; (inverse) Sensperte malkaŝema kaj kredema, kiel infano.

7. En la fabeloj, giganto infanmanĝanta; En neprecizigita loko.

8. Ĉefurbo de Mongolio.

9. Prep. montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto; Simbolo de metalo arĝentoblanka, brila, facile oksidebla, tre facile fandebla, uzata aloje kun kupro kaj zinko por estigi bronzon, kun plumbo por luti, kaj pure por tegi per maldika tavolo feron aŭ kupron; Medikamento malmola, globetforma, senmaĉe glutenda.

10. Kruela turmento, uzata aŭ por eltiri konfeson aŭ por puni; Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo.

Vertikale

1. Batilo, konsistanta el peza ferpeco kun ligna tenilo kaj servanta por enigi najlojn, forĝi feron ktp; Sufikso esprimanta pasivon dum plenumiĝo (t.e. daŭro aŭ ripetiĝo) de la procezo (t.n. «de pasiva prezenca participo»).

2. (inverse) Membro de grupo, de societo; Tio, kio estas difinita por gvidi la agadon, konduton, studon, verkadon ks.

3. La plej granda insulo el Cikladoj (25°23'E, 37°06'N);

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

Senvokala pli-malpli longa objekto cilindroforma.

4. Parto de la tersurfaco, konsiderata el aparta vidpunkto; Rostita pantranĉ'.

5. Senvokala oranĝeta ĉefstelo (α Bootis) en la konstelacio Bovisto, unu el la ses plej helaj steloj.

6. Pronomo uzata por demandi pri afero, konkreta aŭ abstrakta; Pronomo uzata por referenci al insekca estaĵo.

7. Nedifina pronomo reprezentanta iun objekton, aferon, ideon; Unua duono de «miloblo» prefikso; Pli-malpli mola substanco, preparita el graso kaj alkalo, uzata por lavpurigi.


8. (inverse) Ag' de iu, kiu sukcesas ricevi ion petitan; Montra pronomo signifanta «tiu afero (aĵo, ideo k.a.)».

9. (inverse) Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj; De malaltaj plantoj—unu-, dukaj plur-jaraj herboj kaj kelkaj arbustetoj—kun unuopaj, 5-sepalaj kaj 5-petalaj, plejofte ruĝbluaj, unuspronaj floroj kaj kun trivalvaj kapsuloj, kun ĉ. 400 sp-oj, pluraj kultivataj por ornamo, medicino, parfumoj aŭ konfitaĵoj.

10. Homo, kiu per helpo de sciencaj metodoj kondukas kaj direktas teknikajn laborojn (konstruadon de maŝinoj, vojoj, pontoj ks, aŭ ekspluatadon de terbieno).

11. Adverbo montranta daŭron aŭ ripetiĝon de la verbo kiun ĝi priskribas; Nedifina pronomo reprezentanta iun objekton, aferon, ideon; (inverse) Grasa likv' de origino vegetaĵa, animala aŭ minerala, uzata por nutrado, medicino, lumigado, arto, industrio kaj religiaj ceremonioj.

12. Metallo grizeta tre dura kaj rompiĝema kun simbolo Mn; (inverse) La nomo de la 21a grafemo de la E-a alfabeto.



19

Fakte, la etoso en la ĉefpolicejo estis tute alia, ol li atendis. Troviĝis tie multaj homoj. Ĉiu gazeto ŝajne havis tie raportiston kaj fotiston. Se konsideri la voĉojn kaj la aspekton de la vizaĝoj, ĉiuj ĉeestantoj jam trinkis pli — kaj ne akvon — ol oni normale imagus ebla en tia loko.

"Berto! Alportu plian botelon!" iu kriis, dum apudulo lia diris, direktante al Rikardo okulojn iom mis-celajn: "Je via sano, knabo, je via sano!"

Iu sentis sin devigita prezenti al Rikardo la ĉefrolulojn:

"S-ro Ipsilón, ĉefĉefo de Sekuriks. S-ro Ikso, estrestro de la polico. Sinjoro Zo, ĉefestro de Plinov, la konata magazeno."

Nur tiam Rikardo rimarkis, ke ankaŭ Katarina kaj Milan ĉeestas. Li aliris ilin.

"Kio okazas? Ĉu ili perdis la kapon?"

"Tute ne. Ili feliĉas, kaj esprimas sian feliĉon en iom nedigna maniero, sed ne pro tio malpli valora. Atentu. Iu ŝajnas deziri alparoli la ĉeestantaron."

Ruĝvizaĝulo staris, kun glaso en la mano, kaj per malprecizaj mansignoj provis estigi iom da silento.

"Iom da atento, mi petas, geamikoj," li diris, kaj malrapide la bruo etiĝis.

"Mi trinkas je la sano de tri gejunuloj, dank'al kiuj ni sukcesis kapti la plej danĝeran ulon el bando de teroristoj, kiujn ni longe serĉadis. Tiu bando, kiel vi scias, respondecas pri la morto de multaj homoj, kiuj faris nenion malbonan, sed nur malbonŝance troviĝis surloke, kiam eksplodo destinita teruri la popolon neatendeble okazis en strato multhoma."

"Vivu, vivu!" iu kriis.

"Kiel vi ankaŭ scias, mono estis proponita por tiuj, kies precizaj informoj ebligis al la polico kapti unu el tiuj mortigistoj. Nu, nome de la ŝtato, kaj en mia funkcio de polica parolperanto, mi havas la grandegan plezuron transdoni al niaj tri kuraĝuloj ĉekon, kiu signas la dankemon de nia tuta loĝantaro pri ilia grandfaro. Dank'al ili ni kaptis la aĉulon, kaj certe ni baldaŭ kaptos la aliajn en la bando. Krome, dank'al tiuj gejunuloj ni sukcesis malebligi, ke okazu terura eksplodo en Plinov, kun neimageblaj, sed certe suferplenaj sekvoj por la personoj, kiuj troviĝos ĉi-posttagmeze je la kvara en tiu ĉiovendejo. Kaj, kompreneble, por iliaj familioj. Alproksimiĝu, geamikoj, ĉu vi deziras unu ĉekon por la tri, aŭ tri samvalorajn ĉekojn?"

"Al mi..." komencis Rikardo.

"... tute ne gravas," diris Katarina.

"Nu, nu," dubemis Milan.

"Dankon, geamikoj," la policano elparolis pli mallaŭte, "sed pardonu, ne estas sufiĉe da loko por skribi tri nomojn, kaj tio eble estigus malfacilaĵojn ĉe la banko. Mi do faros tri ĉekojn." Lia voĉo relaŭtiĝis por diri: "Mi gratulas vin. Ni ĉiuj trinku je ilia sano."

La glasoj malpleniĝis, dum manoj batis manojn por brue esprimi ĉies ĝojon kaj estimon al la tri gejunuloj.

Alta maldikulo ekstaris.

"Mi estras Plinov," li diris. "Kaj mi volas montri mian dankemon al la Sekuriks-gardisto, kies kuraĝo ebligis, ke ne okazu la terura mortigado preparita por ĉi tiu posttagmezo. Venu ĉi tien, junulo. Jen ĉeko por vi."

"Sed...", komencis Rikardo, al kiu ĉies okuloj estis turnitaj, dum li pensis pri sia ne speciale kuraĝa restado en la enŝlositejo.

Feliĉe, Katarina tuj vidis, kion li pensas. "Iru kaj prenu, ni partigos poste," ŝi diris apenaŭ aŭdeble en lian orelon. Rikardo, ĉiam obeema, iris kaj prenis.

Kaj jen ekparolis la direktoro de Sekuriks:

"Mi estas ĝoja kaj feliĉa, ke vi estas ano de la granda Sekuriks-familio," li solene elparolis. "Dank'al vi oni ĉie en la lando parolos plej estime pri nia firmao. Ankaŭ mi forte deziras signi per plej realeca dono la dankemon de Sekuriks al unu el ĝiaj multaj kuraĝuloj. Venu morgaŭ al mia oficejo, knabo, kaj vi ricevos ion, kion vi neniam forgesos. Dume, mi proponas, ke ni ĉiuj trinku pli je via sano."

Pliafoje, trinkobruoj sonis tra la ĉambro.

"Nu, gesinjoroj," la poliestro alparolis la ĉeestantaron, "ŝajnas al mi, ke ni multe laboris. Estas nun ege malfrue, kaj mi ne dubas, ke vi ĉiuj konsentos, se mi proponos, ke ni iru dormi. Gratulon al niaj savintoj, dankon al vi sinjoroj gravuloj, kaj bonan nokton al ĉiuj, kiom da nokto restas."

Ĉiuj brue disiĝis.

(daŭrigota)



Karter (Aleksandr Basov)

1/ Kiam vi decidis lerni Esperanton, kion vi deziris ricevi?

Dum la aprilo de la 2014-a mi kaptis informon pri Esperanto kaj decidis ekscii pri ĝi pli multe. Hazarde mi trovis la telefonnumeron de



Irina Gončarova, telefonis al ŝi kaj trafis samtage al la prelego pri Esperanto en la antikafejo "Ciferblat". Tie mi demandis pri ĉio, kio min interesis. Mi interesiĝis, ĉu eblas ellerni Esperanton rapide, ĉu Esperanto helpas lerni aliajn lingvojn, ĉu ekzistas homoj, kiuj parolas Esperante de la naskiĝo. Irina ĉion klarigis kaj proponis lerni Esperanton en ŝia kurso FaRo. Tiam mi ne kredis, ke eblas komenci paroli fremdlingve post dek lecionoj, kaj decidis provi. Mi longe atendis tiun kurson kaj kelkfoje memorigis al Irina pri mi. Nur septembre komenciĝis la lernado.

2/ Kiel vi lernis la lingvon?

Al mi tre plaĉis la kurso. Post la unua leciono mi memoris pli ol 50 procentojn de la materialo. Post la dua mi memorfiksis preskaŭ ĉiujn el 100 proponitaj verboj. Post la naŭa mi komencis iomete kompreni la retajn radiostaciojn. Tuj post la kurso ni venis en Jekaterinburgon al la Aŭtuna lingvotrejnado kaj tie mi jam eĉ parolis Esperante. Mi konatiĝis kun bonegaj homoj kaj veraj esperantistoj. En la komenco de la 2015 jaro estis gramatika daŭriga kurso el 6 lecionoj kaj februare okazis la tritaga lingvomergiĝo "APERo", dum kiu mi vere ekparolis. Mi aliĝis al la asocio "MASI" kaj partoprenis multajn ĝiajn projektojn.

3/ Kiel Esperanto ŝanĝis vian vivon?

Nun mi povas diri, ke Esperanto feliĉe venis en mian vivon kaj radikale ŝanĝis ĝin. Mi ekhavis multe da konatoj kaj eĉ amikoj, mi vizitis kelkajn novajn urbojn, eksentis min kiel parto de io granda kaj grava.

Fonto: **MiA Masi #1/5 januaro 2018**

Vojaĝo al Esperantujo

facila rakonto de Apáti Kovács Béla, el Hungario

Ĉi somere mi feris en Esperantujo. Certe vi ankoraŭ ne aŭdis pri tiu ĉi belega lando. Ĝi situas en granda oceano sur verda insulo. La insulanoj ĉiuj parolas Esperanton, kaj per tiu ĉi lingvo ili bonege komprenas unu la alian.



Per ŝipo mi alvenis la insulon. Belaj fraŭlinoj akceptis min en la haveno. Tiam mi

ankoraŭ ne parolis tiun ĉi interesan lingvon, sed jam en la unua momento mi sentis, ke mi konas ĝin iel. Multaj vortoj kaj esprimoj tuj estis konataj por mi. Se oni parolis al mi malrapide, tiam mi komprenis la tieajn homojn. Ankoraŭ tie sur la insulo mi decidis ellerni Esperanton. Tion ekaŭdante la praloĝantoj ege, ege ĝojegis kaj komencis vokadi min: "Estu salutate, samideano!"

Tiuj ĉi homoj estas tro idealistaj, ili kredas la tutteran pacon kaj tian mondon, kie malaperos la lingvaj bariloj. Ilia lingvo fariĝos la dua lingvo de la homaro. Ĝi estas belega revo. Tie sur la insulo mi spertis ĝiajn utilojn ankaŭ en la praktiko.

Post kelkaj tagoj ankaŭ mi kredis je ilian ideon.

Jam la duan tagon mi konatiĝis kun ĉarmulino sur la bordo de la oceano dum la sunumado. Ŝi estis simpatia junulino, kaj ŝia verda, steloplana bankostumo tute frenezis min. Ĝi apenaŭ kovris ŝian perfektan korpon. Ŝi tuj rimarkis, ke mi estas fremdulo, ĉar la lokanoj ĉiuj posedis Esperanto-insignon aŭ objekton montrante, ke ili estas la adeptoj de tiu ĉi grandioza lingvo. Tiel komenciĝis nia babilado. Mi iris al ŝi kaj mi demandis:

- Ĉu apud vi estas libera loko? Espereble mi ne ĝenas vin.

Ŝi ĵetis rigardon al mi kaj ekridetis:

- Bonvolu! Komprenble la bordo apartenas al ĉiu. Krome ni estas homfratoj. Ĉefe, ke ni komprenu unu la alian. Ĉu ne? Kuŝiĝu samideano!

Subite mi rimarkis, ke ankaŭ ŝiaj orelopendaĵoj estas etaj verdaj steloj. Ĉio ĉirkaŭ ŝi temis pri Esperanto. Tiam ankoraŭ por mi tio estis tro stranga. Tiuj ĉi homoj tage kaj nokte pensas pri la zamenhafa lingvo.

Nur kelkajn tagojn estis stranga por mi ilia granda entuziasmo. Ankaŭ mi baldaŭ infektiĝis, kaj post du semajnoj jam ankaŭ mi parolis kaj pensis tiel, kiel la praloĝantoj.



Nia romanco ne finiĝis oceanborde, ĉar jam vespere post la agrabla sunumado mi vespermanĝis kun ŝi en animagorda restoracio de la hotelo.

Dum mia tuta feriado mi tre bone fartis sur tiu verda insulo. La esperantista homo estas tre helpema kaj bonkora. Ilia pasio paroli pri la interna ideo. Mi konfesas, komence tio ĝenis min, sed poste mi alkutimiĝis, eĉ ankaŭ mi parolis pri ĝi al la novalvenintoj, kiuj ankoraŭ ne aŭdis pri la Internacia Lingvo.

Rapide forflugis la du semajnoj kaj mi devis hejmenvojaĝi al mia griza, monotona vivo. Mi iĝis vera, persista esperantisto. Min tute ravis mia ĉarma konatulino, kiun mi ekkonis sur la bordo de la oceano.

Kun dolora koro mi adiaŭis de tiu ĉi belega insulo, kie ĉiu parolas saman lingvon, kaj malaperis la lingvaj bariloj.

Estus bone, se la tuta terĝlobo verdiĝus kaj la

homaro bezonus nur du lingvojn, la gepatran kaj Esperanton.

Amiko, ĉu vi diras, ke ĝi estas utopio?

Tion mi ne kredas, ĉar jam ekzistas tia verda insulo en granda oceano. Tie la homoj bonege komprenas unu la alian helpe de Esperanto.

Post mia ferio mi hejmenvojaĝis, sed ankoraŭ en la ŝiphaveno mi decidis, tuj mi revenos kaj ankaŭ mi fariĝos la civitano de tiu ĉi verda insulo. Tie ĉi la vivo estas paca kaj harmonia.

Amiko, mi invitas ankaŭ vin. Venu kun mi kaj ni translokiĝu al Esperantujo. Mi garantias, ankaŭ al vi plaĉegos tiu ĉi grandioza vivformo.

Ne hezitu! Baldaŭ mi ekiros, mi jam aĉetis ankaŭ la vojaĝbileton.

Sed nur tien.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (20)

DUA PARTO - LA VIVO

39

Tiuj, kiuj iam atingis Unuon:

Ĉielo atingis Unuon kaj fariĝis pura.

Tero atingis Unuon kaj fariĝis firma.

La dioj atingis Unuon kaj fariĝis potencaj.

La valo atingis Unuon kaj pleniĝis.

Ĉiuj aĵoj atingis Unuon kaj ekestis.

Reĝoj kaj princoj atingis Unuon

kaj fariĝis la modelo de l' mondo.

Ĉion tion efikigis Unuo.

Se Ĉielo ne estus pura per tio, tiukaze ĝi devus krevi.

Se Tero ne estus firma per tio, ĝi devus ŝanceliĝi.

Se la dioj ne estus potencaj per tio, tiukaze ili devus rigidiĝi.

Se la valo ne estus plenigita per tio, tiukaze ĝi devus elĉerpiĝi.

Se ĉiuj aĵoj ne estus ekestintaj per tio, tiukaze ili devus estingiĝi.

Se la reĝoj ne estus majestaj per tio, tiukaze ili devus renversiĝi.

Tial la radiko de la nobla estas la malnobla.

La alta bazas sin sur la malalta.

Do tiel ankaŭ la princoj kaj reĝoj:

Ili nomas sin: "Soleculo", "Orfulo", "Malgravuo".

Per tio ili deklaras la humilan kiel sian radikon.

Aŭ ĉu ne estas tiel?

Ĉar sen la partoj de ĉaro ne ekzistus ĉaro.

Deziru al vi ne la brilantan trembrilon de la juvelo, sed la malglatan krudecon de l' ŝtono.



Rimarkoj de Anniespera

Wang Chongfang atentigas nin, ke la Unuo estas alia nomo por Taŭo. "Ĉar sen la partoj de ĉaro ne ekzistus ĉaro", tiu frazo deflankiĝas de la originala teksto. En la originala teksto la vorto „yu“ (fonetike) ĉi tie egalas „honoron“, kies origina senco ja estas ĉaro, sed ĉi tie ĝi estis ŝanĝe uzita. Vd. el Wang Chongfang: "Tial serĉi tro da honoro signifas tute perdi la honoron."

Rimarkoj de Cezar

Ke la noblulo rigardas la malnoblan kiel sian radikon, estas plua tre interesa frazo de Laocio, kiu denove montras, kiel dialektike li pensis, certe li estis influata ankaŭ de la antikva greka filozofio, kiu sur la grandaj komercvojoj, disvastiĝis ĝis Ĉinio. En morkanto de revoluciemaj kamparanoj en Eŭropo oni kantis en la mezepoko: "Sed kiam Adamo fosis kaj Evo ŝpinis, kie estis tiam la nobelulo?" La tiama konkludo estis, ke kamparanoj estas eĉ pli gravaj por la vivo de ĉiuj ol la nobeluloj. Nun la laboristoj kaj kamparanoj estas tiuj, kiuj estas pli malhaveblaj por la vivo de ĉiuj ol ĉiuj politikistoj, ĉar sen ili la politikistoj baldaŭ mortus pro malsato kaj estus eĉ nudaj, ĉar la vestojn de ĉiuj produktas kutime la malestimata laboristaro de la tekstilindustrio. La lasta alineo povus esti indiko, ke Rikardo Vilhelmo estis framasonisto, tiel, kiel ankaŭ Zamenhof. La kruda ŝtono en la framasonismo estas la instruato, la metia lernanto, kiu devas trapaŝi kelkajn ekzamenojn antaŭ ol li fariĝas majstro. En la originalo ne temas pri kruda ŝtono sed pri roko, kompare al jado

(daŭrigota)

Mallonga Historio de Filozofio (27)



Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Søren Kierkegaard (1813-1855)

Ni ĉiuj scias la rakonton de Abrahamo el la Biblio. En tiu rakonto

Abrahamo devas oferi sian filon laŭ dia ordo. Li estas pia homo kaj tial li scias, ke li devas obei al dia ordono. Do, li kunprenas sian filo al la altaro en la supro de monto Moriĵa por oferi lin sed Dio kompatas ilin kaj sendas anĝelon kun mesaĝo kaj virŝafon por ke li oferu anstataŭ sian filon. Ĉi tiu estas rekompenco por kredo kaj fido: "Estu pia kaj Dio rekompencos vin". La ĉefa punkto kaj instruo ĉi tie estas ne dubi pri la ordonoj de Dio.



Søren Aabye Kierkegaard estis dana filozofo, telogo, poeto, socia kritikisto kaj pia verkisto, kiun oni poste konsideris esti la unua eksistizma ¹ filozofo.

La rakonto de Abrahamo ne estis tiel simpla afero por Kierkegaard. En sia libro "**Timo kaj Tremo**" li priskribis la timon kaj tremon de Abrahamo survoje al monto Moriĵa. Kierkegaard estis malgranda, maldika kaj tre stanga viro. Lia familia nomo en la dana signifis "tombejo". Tage li diskutis aferon kun konatuloj kaj nokte li verkis. Li ŝatis ŝajni kiel la "dana Sokrato". Li estis tre laborema homo sed li spertis tre grandan doloron en sia vivo: Li enamiĝis al Regine Olsen kaj proponis al ŝi geedziĝon. Ŝi akceptis, sed poste Kierkegaard pro siaj strangaj kredoj kaj pieco pentis pri tio kaj skribis al ŝi leteron, ke li ne povis geedziĝi kun ŝi. Ili ambaŭ sentis bedaŭron, doloron, malfeliĉon kaj ruinigis siajn vivojn.

Post tio Kierkegaard komencis verki pri kiel homoj devas vivi, kiel decidi, kaj kiel la homo povas esti certa, ke la vivdecidoj estas ĝustaj. En sia libro "**Ĉu tio, Ĉu alia**" priskribas la alternativojn, ĝui la vivon kaj ĉasi la belon kontraŭ vivi tradicie. Alivorte la elekto inter etiko kaj estetiko. Liaj pensoj en la fino ĉiam

atingis la kredon je Dio. Kredi je Dio ne estis por li simpla afero. Konduti laŭ kredo povus esti kontraŭ la tradiciaj pensoj. Kio okazus se Abrahamo tuj oferus sian filon? Ĉu la ordono de Dio estis etika? Oni ja povas miri pri la pieco de Abrahamo sed ĉu li ne povus konduti tute erare? Kio pri, se la ordono ne venis el Dio? Eble ĝi estis halucino aŭ eble li freneziĝis. Kiel li povus estis certa pri la ordono? Ŝajnas ke Abrahamo havis tre altan fidon al Dio alie ne povus ekzisti "kredo". Kredo inkluzivas riskon kaj estas ne racia, ĝi ne baziĝas sur menso.

Kierkegaard konkludi, ke la plej alta devo de patro, do, ne estas portekti sian filon. Abrahamo ŝajnas al ni tre kruela, sed la dia ordono, kia ajn ĝi estas, estas la plej alta afero kaj homa etiko kontraŭ tia ordono fariĝas tute ne grava.

Kierkegaard estis pia Kristano sed li malamis la danan eklezion. Por li kunveni por preĝi ne estis religio. La dana eklezio distordis kaj misformis Kristanisman. Por li ĝi ne estis kristana eklezio. Li tiel farigis neamata persono ĝuste tiel, kiel Sokrato en Ateno (vidu Turka Stelo #002) Tio, kion Kierkegaard provas diri en siaj libroj fakte ne estas tiel klara por ke ni povu ĝin kompreni. Li estis filozofo kiu ne eksplikis klare siajn pensojn sed li fakte invitis homojn al mempensado. Li ĉiam provis altiri homojn al la diskuto li malfermis en siaj libroj kaj paroladoj. Li kutime verkis kun kaŝnomoj ne nur por kaŝi sin, ĉar la leganto tuj komprenis kiu estas la vera verkisto post tiu kaŝnomo, sed por montri la mondan vidpunkton de diversaj homoj. Liaj libroj estis fikciaj kiel romanoj. Li priskribis rolulojn kiel veraj homoj kaj la homajn aferojn inter ili por montri sian perspektivon kaj tial komenci diskutojn.

Kierkegaard mortis juna, kiam li estis 42 jaraĝa. Li neniam feliĉiĝis. Regine post sia malfeliĉa periodo kun Kierkegaard konatiĝis kun ŝtata oficisto kaj ili gedziĝis kaj plej eble feliĉiĝis. Li kiel filozofo kaj liaj malĝojigaj libroj fariĝis fama poste en la 20-a jc.

(daŭrigota)

¹ **ekzist(ad)ismo**. Ф Doktrino, laŭ kiu la homo, kies ekzisto estas komence preskaŭ nur metafizika, kreas sin mem per la elekto inter la diversaj eblaj agoj k por la plenumado de tiuj agoj; por tiu skolo, ekzisto antaŭas esencon. Sin. ekzistencialismo.

Kiujn retejojn kun Esperanto-tradukoj, sed ne pri la Esperanto-movado, vi ofte uzas per Esperanto?

Wikipedio	35.80%
Fejsbuko	21.00%
Hazardaj Retejoj	7.40%
Reddit	6.20%
Jutubo	6.20%
Telegramo	4.90%
Monato	2.50%
Scivolemo.wordpress.com	2.50%
Tatoeba	2.50%
Duolingo	2.50%
Medium	2.50%
Twitter	1.20%
Ipernity	1.20%
Loomio	1.20%
Ĉina Radio Internacia	1.20%
Le Monde Diplomatique	1.20%

origine anglalingvaj retejoj, kiuj estas ĉefe uzataj.

Kiujn retejojn pri la Esperanto-movado vi ofte uzas?

Ne uzas	31.50%
Libera Folio	17.60%
Retejo de asocioj	13.00%
Esperanto-sekcio de Reddit	11.10%
Edukado.net	4.60%
Lernu.net	4.60%
La Ondo	3.70%
Vortaro.net	1.90%
Esperanta Retradio	0.90%
La Hodiaŭa Ĵurnalo	0.90%
Scivolemo	0.90%
Kerna Punkto	0.90%
Amikumu	0.90%
Adventures in Esperanto	0.90%
El Popola Ĉinio	0.90%
UEA	0.90%
Monato	0.90%
PMEG	0.90%
Revo	0.90%
Ĉina Radio Internacia	0.90%
Esperantujo.directory	0.90%

bedaŭregas, ke UEA eĉ ne aperas en ĉi tiu listo. Mi esperas, ke post la renovigo de uea.org, esperantistoj povos pli bone legi novaĵojn ankaŭ tie.

Se vi ricevas retroŝtitajn informilojn (retleteroj, bitgazetoj, ĵurnaloj ktp) ofte en Esperanto, kiujn vi ricevas?

Richard (Evildea): Honeste, nenio en ĉi tiu listo surprizas min.

Robert Nielsen: Wikipedio kaj Fejsbuko denove estas la gigantoj. Interesas, ke Scivolemo kaj Monato estas la solaj esperantaj retejoj, la aliaj estas originalaj anglalingvaj retejoj.

Robin van der Vliet: Ankaŭ interesas min, ke estas plejparte

Richard (Evildea): La afero, kiu plej interesas min pri ĉi tiu rezulto, estas la manko de diverseco.

Esperantistoj ŝajnas uzi tre malmultajn fontojn por konatiĝi kun la movado. Mi mem ĉiutage uzas Reddit kaj ankaŭ mi ofte kontrolas Liberan folion kaj la Ondon de Esperanto por pli detalaj informoj.

Chuck Smith: Estas interese, ke Libera Folio estas la giganto rilate al novaĵoj en Esperanto kaj mi

Richard (Evildea): Kvankam mi estas membro de UEA, TEJO, AEA kaj de la Esperanto-Federacio de Novsudkimrio, mi tamen maloftege legas tiajn oficialajn organojn. Malgraŭ tio, mi preskaŭ ĉiun semajnon legas la retleteron Aŭstraliaj esperantistoj. Kutime ĝi estas malpli ol tri paĝojn longa kaj aktuala. Mi ŝatas tion.

Chuck Smith: Laŭ mi, ĉiam la plej grava retroŝta informilo inter ĉiuj estas TEJO Aktuale. Ĝi ĉiam tre koncize resumas ĉion kaj legante nur tion, oni tre bone povus resti ĝisdata pri ĉio, kio okazas en Esperantujo.

Robin van der Vliet: Mi membras en diversaj organizaĵoj, kiuj kelkfoje sendas informilojn, sed

kvankam tio, mi vere malofte legas retroŝtitajn informilojn.

Se vi elŝutas kaj legas Esperanto-librojn, kiujn librojn vi legis?

Richard (Evildea): Mi memoras, ke kiam mi esperantistiĝis, ĉiuj rekomendis, ke mi legu la libron Gerda Malaperis, do ne surprizas min, ke ĝi estas tiel populara. Ankaŭ mi legis parton de La Hobito kaj aŭskultis la sonlibron Alicio en Mirlando. Mi ne estas legemulo, tamen mi jam legis preskaŭ duonon de la libroj en tiu listo. Kiam



Ne ricevas	42.30%
Revuo de Esperanto	11.30%
Usona Esperantisto	7.20%
Edukado.net	4.10%
Monato	3.10%
Esperanto USA	3.10%
TEJO Aktuale	3.10%
Asocia Letero	3.10%
Kontakto	3.10%
Gazetaraj Komunikoj de UEA	2.10%
Heroldo de Esperanto	2.10%
Libera Folio	2.10%
Aŭstraliaj Esperantistoj	1%
Informilo de Esperanto-Nederland	1%
Umuj	1%
La Ondo	1%
UEA Komunikaĵoj	1%
Flandra Esperanto Ligo	1%
Laste Aperis	1%
Turka Stelo	1%
Brazila Esperanta Ligo	1%
Novaĵoj de la Novzelanda Esperanta Asocio	1%
Ekparolu	1%
Hodiaŭa Ĵurnalo	1%
Fejsbuko	1%

Ne ricevas	42.30%
Revuo de Esperanto	11.30%
Usona Esperantisto	7.20%
Edukado.net	4.10%
Monato	3.10%
Esperanto USA	3.10%
Aliaj	30.30%
Ne legas	24.20%
Gerda Malaperis	14.10%
Multe da libroj	10.10%
La Hobito	4.00%
Alicio en Mirlando	3.00%
1984	2.00%
Kredu min sinjorino	2.00%
Hari Poter kaj la Ŝtono de Saĝuloj	2.00%
Sankta Biblio	2.00%
La Murdo en la Orienta Ekspreso	2.00%
Maziri en la Magiisto	2.00%
La eta Princo	2.00%

mi skribas, "legi" mi honeste devas diri, ke mi eble legis ĉapitron aŭ du.

Chuck Smith: Mi daŭre kredas, ke la plej interesa libro por komencantoj estas Fajron sentas mi interne kaj miras ne vidi ĝin en ĉi tiu enketo.

Robin van der Vliet: Mi mem neniam vere plene legis Esperantan libron, sed mi ja rekonas preskaŭ ĉiujn librojn de ĉi tiu listo. Mi supozas, ke miaj mezlernejaj instruistoj detruis mian legemon per tro da literaturo.

Se vi aŭskultas Esperantajn podkastojn, kiujn podkastojn vi aŭskultas?

Ne ricevas	42.30%
Revuo de Esperanto	11.30%
Usona Esperantisto	7.20%
Edukado.net	4.10%
Monato	3.10%
Esperanto USA	3.10%
Ne aŭskultas	41.50%
Kern.punkto.info	25.50%
Varsovia Vento	6.40%
Muzaiko	6.40%
Aliaj	5.30%
Pola Retradio	4.30%
Ĉina Radio Internacia	2.10%
Radio Esperanto	2.10%
3ZZZ Radio en Esperanto	2.10%
Radio Scienca	2.10%
Movada Vidpunkto	2.10%

Richard (Evillea):

Kelkajn fojojn mi aŭskultis la podkaston kern.punkto.info. Mi ŝatas, ke Eva kaj Johannes profunde esploras sian temaron. Ankaŭ mi ofte aŭskultas Muzaikon laboreje ĉefe por la muziko. Kvankam mi estas aŭstraliano, mi malofte aŭskultas 3ZZZ ĉar mi volas ekzerci min per akĉentoj de neaŭstralianoj.

La alia podkasto, kiun mi ŝatas aŭskulti estas Vatikana radio. La parolisto

de Vatikana radio parolas Esperanton rapide tamen klare kaj belsone. Kvankam religiaj temoj povas esti enuigaj, mi rekomendas, ke oni aŭskultu ĝin por vere ekzerci sin.

Chuck Smith: Kvalite nenio kompareblas al Kern.punkto.info kaj Pola Retradio mia opinie. La temoj de Kern.punkto tamen plej interesas min. Tamen dirinte ĉion ĉi, mi plej ofte aŭskultas Muzaikon, sed kiel radio kaj ne kiel podkasto.

Robin van der Vliet: Estas iom surprize, ke sufiĉe granda kvanto ne aŭskultas podkastojn. Sed mi fakte mem ankaŭ ne tiom ofte faras tion. Kelkfoje mi aŭskultas la podkaston kern.punkto.info, kiam certa

temo aparte interesas min. Sed plej ofte mi aŭskultas Muzaikon, precipe fone kiam mi faras ion alian.

Se vi spektas Esperanto-jutubistojn, kiujn jutubistojn vi spektas?

Richard (Evillea): Oni kutime ne konscias, ke estas dekoj da bonegaj Esperanto-kanaloj en Jutubo. Ĉiuj el ili meritas atenton. Eĉ se vi malŝatas mian kanalon, mi certas, ke vi povas trovi ion, kio plaĉas al vi. Mi nun volas rekomendi kelkajn ne listigitajn en la respondoj al ĉi tiu enketo. Bedaŭrinde, ne ĉiuj estas ankoraŭ aktivaj: Esperanto VBlogo, Justin Mair, Spektaklo de Klaudius kaj Livia kaj Verdaj Aferoj de Ginny.

Estas tre malfacile esti jutubisto en Esperantujo. Oni ne povas enspezi, oni ne povas kreskigi grandan spektantaron, oni eĉ ofte ne povas ĝui ĝin kun siaj amikoj kaj familianoj. Do, mi volas memori esperantistojn, ke ili konduku afable prikomentante filmojn de aliaj esperantistoj.

Chuck Smith: Ne surprizas min, ke Evillea vere estas la motoro de agado en JuTubo. Antaŭ lia kanalo, mi apenaŭ povis pensi pri eĉ unu grava kanalo... nu, estis la interesa kanalo de Manekeno, sed mi bedaŭras, ke ŝi ne produktis pli da filmetoj. Mi ĝojegas pri la nova epoko de Esperanto en JuTubo, kiu okazis post la apero de la kurso de Duolingo!

Robin van der Vliet: Ankaŭ tute ne surprizas min, ke tiom multe da homoj spektas la videojn de Evillea. Li estas la unua persono, pri kiu mi pensas, kiam mi pensas pri Esperanto ĉe Jutubo. Ankaŭ estas interese, ke aperas pli da jutubistoj en Esperanto lastatempe.

Richard Delamore

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2018/02/interreto>

Ne ricevas	42.30%
Revuo de Esperanto	11.30%
Usona Esperantisto	7.20%
Edukado.net	4.10%
Monato	3.10%
Esperanto USA	3.10%
Evillea	42.50%
Ne spektas	21.70%
Aliaj	8.50%
Vanegge	6.60%
Alex Miller	4.70%
Jozefo Vlogs	3.80%
Jake H	3.80%
Language Stuff	2.80%
Katalin Kováts	1.90%
Lunuloj Ni Ludu	1.90%
Esperanto Variety Show	1.90%

TRAIRADO

Dum la vojaĝo de l' vivo multaj estas trompitaj de la ruzeco de l' pado,


Ĉar la vojo estas longa: ĉiam transiranta supren, ĉu oni volas aŭ ne.

Tamen, vojeto mallonga estas negrava detalo, kvazaŭ tranĉo de l' sorto.

Oni bezonas trairi la tutaĵon de la vojo; ĉu en sonĝoj de flugo,

aŭ eble inter la dornoj, kiuj minacas l' irejon.


Pasaĝeroj de l' eterno, ni estas vagantaj lumoj, al ĉiel' aŭ infer' strebe.



Poemo de Maria Nazaré Laroca

La doktoro sidas antaŭ la kliento en malluma ĉambro. La kliento aŭdas nenion krom mallaŭtan fonmuzikon kaj fokusiĝas je la pendolo, kiun la dokoro tenas. Mallaŭte kaj malrapide la doktoro alparolas la klienton ĝis li klakas per la fingroj kaj la kliento tuj endormiĝas. Kompreneble hipnoto ne ekzistas tiel, kiel filmoj montras ĝin, sed pri kion hipnoto signifas kaj kiel ĝi funkcias sciencistoj jam longe diskutas. Tiuj demandoj ne estas facilaj, ĉar oni malfacile juĝas ĉu iu vere hipnotas, aŭ nur ŝajnigas tion.

La origino de moderna hipnoto estas la teorio de besta magnetismo, kiu estis elpensita ĉirkaŭ la jaro 1770 de Franz Friedrich Anton Mesmer. La Aŭstria



kuracisto kaj teologo proponis la ideon ke iu nevidebla fluaĵo ekzistas en ĉiuj vivantaj organismoj. Laŭ tiu ideo, oni povus kontraŭbatali multajn malsanojn, se oni povus regi tiun fluaĵon. Multaj

stereotipoj pri hipnoto estas ligeblaj al Mesmer, kiu "kuracis" siajn klientojn en malhelaj ĉambroj kun fonmuziko kaj uzis mangestojn por regi la fluon. La strangaj metodoj igis lin famaj en Francio kaj li estis invitata de altstatusaj kaj gravaj personoj kiel la reĝino, Marie Antoinette. La reĝo, Louis XVI, malpli ŝatis la novan teorion kaj petis la Francan akademion de sciencoj esplori la situacion. Oni kunigis komisionon el sciencistoj por la tasko, kiu elpensis plurajn eksperimentojn por eltrovi ĉu besta magnetismo vere ekzistas. Unu el tiuj eksperimentoj estis dezajnita jene: En la ĝardeno, nur unu arbo devus esti magnetigata laŭ la metodoj de Mesmer. Tion faris lia asisto Deslon. Sekve, juna knabo, blindigita per tuko, devis promeni tra la ĝardeno kaj serĉi la preparitan arbon pere de besta magnetismo. Kompreneble la knabo ne sukcesis trovi la ĝustan arbon kaj la sciencistoj konkludis ke besta magnetismo ne ekzistas. La influo de Mesmer tro grandis tamen kaj poste inspiris aliajn esplorojn. Nuntempaj sciencistoj konsentas pri tio ke besta magnetismo ne ekzistas, sed multaj el ili ja kredas je hipnoto. Kio precize okazas kiam oni hipnotas estas malfacile direbla tamen, do oni daŭre dezajnas novajn eksperimentojn kun novaj teĥnologioj kiuj montras kio vere okazas en la cerbo.

Novaj testoj montras ke la hipnoto havas multajn

efikojn kaj aplikojn. Oni sukcesis igi homojn vidi neekzistantajn kolorojn, forgesi kaj rememori, vidi vortojn en la denaska lingvo kiel sensencaĵojn kaj ŝanĝi la stilon de fari decidojn. Oni ne tute perdas sin tamen. Eĉ kiam oni estas hipnotigata, oni daŭre havas sencon de moralo. Kompreni kio precize okazas estas malfacila, sed oni faris amason da eksperimentoj por ekscii ĉu la efikoj estas veraj kaj kio okazas en la cerbo. Unu el la plej simplaj el tiuj eksperimentoj uzas longan liston de koloroj, aŭ filmeto kie la koloroj unuope aperas sur la ekrano. La partoprenantoj de la eksperimento ne devas laŭtlege la nomojn de la koloroj kiuj estas montrataj, sed anstataŭe ili nomu la koloron de la litero. Tiu tasko estas tre malfacila, pro tio ke la cerbo prilaboras ambaŭ stimulojn samtempe. Kiam la nomoj de la koloroj estas skribitaj en lingvo kiun oni ne parolas tamen, la tasko iĝas multe pli facila. Kion ĉi tiu eksperimento provas eltrovi estas ĉu oni povas forgesi la signifon de la vortoj kiam oni hipnotas. Se jes, la partoprenantoj multe pli facile farus la taskon dum la hipnoto, sed se ili nur aktorus, ili ne kapablus pli rapide legi la vortojn. Finfine la partoprenantoj pliboniĝis kiam ili hipnotis, kio aldonis certecon al ekzisto de hipnoto. Oni ne nur mezuris kiom rapide kaj ĝuste la partoprenantoj legis la vortojn, sed ankaŭ metis ilin en skanilon por mezuri la aktivecon de la cerbo. Tiel oni povis vidi ke la partoj de la cerbo, kiuj respondecas pri legi skribitajn vortojn, ne estis aktivaj kiam la partoprenantoj estis en hipnota stato, sed ja en kutima stato.

BLUA
RUĜA
BRUNA
VERDA
FLAVA

Kompreneble la eksperimento plej bone funkcias kiam oni uzas la denaskan lingvon, sed ĉi tiu ekzemplo nur donu ideon pri kiel la testo funkcias.

Por atingi staton de hipnoto ekzistas multege da teĥnikoj. Oni eĉ povas senintence hipnoti. Tio okazas kiam oni perdas sin en interesa libro kaj forgesas la mondon ĉirkaŭ si, aŭ kiam oni biciklis dum kilometroj sur konata vojo, sed je la alveno havas la senton ke oni ne aktive spertis la vojaĝon. Por vere uzi hipnoton por kuracado aŭ scienco, oni tamen bezonas intence hipnotigi homojn. Grava parto de tio estas ke oni sentu sin trankvila. Tial psiĥologoj ofte havas komfortan sofion sur kiu oni povas kuŝi. Eĉ se oni ne tute hipnotos, tio faciligas la malfermiĝon de la kliento. Due, oni ne estu distrata de la medio. Estas favora se

la ĉambro ne havas ĝenajn sonojn aŭ lumojn. Trie, oni multe fokusiĝu. Por tio la hipnotisto povas uzi objekton, kiel la stereotipan pendolon, sed tre ofte oni nur uzas la voĉon. Kiam oni hipnotas, oni malferme reagis al sugestoj. Tiel la hipnotisto povas igi la klienton fari specifajn movojn, aŭ akiri memorojn. La hipnotisto tre bone regas sian lingvouzon kaj parolstilon kaj tiel donas eĉ pli da forto al siaj sugestoj. Oftaj metodoj estas paroli tre trankvile, doni specifan emfazon al la centraj vortoj kaj uzi multajn metaforojn. Oni povas ekzemple igi la sugeston "Bonvolu mallevi vian brakon" per diri "Via brako estas peza ŝtono". Temas pri sugestoj tamen. Per hipnoto, oni povas esplori onian subkonscion kaj fari aferojn kiujn oni kutime ne farus, sed la hipnotisto ne povas igi onin fari ion, al kio oni ne konsentas. Aldone, ne ĉiu persono reagis same al hipnoto. Hipnotigeblo havas normalan distribuon. Tio signifas ke kvarono el la homoj preskaŭ ne reagis al hipnoto, dum alia kvarono tre facile hipnotas kaj reagis tre bone al kaj fizikaj kaj mensaj sugestoj. La resto de homoj, la plejparto do, troviĝas ie en la mezo sur tiu spektro.

tiu teorio, hipnoto estus kvazaŭ tranco, kiu igus la cerbon funkcii malsame dum iom da tempo. Oni ne estas tute konscia pri kio okazas kaj iĝas pli malferma al sugestoj. Tio kongruas kun la datumoj, kiujn oni akiris per cerbskanado, ĉar kelkaj regionoj de la cerbo iĝas malpli aktivaj dum la hipnoto. Alia teorio estas ke oni estas tute konscia dum hipnoto, sed ke la efikoj estas malveraj. Kompreneble la efikoj estas mezureblaj, sed laŭ tiu ĉi teorio, ili ne estas kaŭzataj de tranco, sed pro tio ke oni mem kredas je hipnoto.




fMRI estas grava metodo por rigardi en la cerbo.

Tio kompareblas al la placeboefiko. La diversaj partoj de la cerbo tuttempe influas unu la alian kaj antaŭsupozoj povas influi la informojn kiujn oniaj sensoj provizas. Tiel la cerbo povas aktori kvazaŭ ĝi hipnotas, eĉ se oni estas tute konscia.

Kiel ajn ĝi funkcias, hipnoto estas utila. Ĝi estas uzata por amuziĝi, sed ankaŭ kiel kuracilon kaj por esplorado. Oni povas lerni multe pri la cerbo kaj memoro per hipnoto, kio igas ĝin interesa ilo por sciencistoj. Ankaŭ el si mem hipnoto estas vasta temo por esplorado. Kiel kuracilo ĝi povas esti uzata por la plej diversaj problemoj kiel fizika doloro, homoj kiuj volas ĉesi fumi kaj eĉ por helpi dum naskado. La eblecoj estas senfinaj, se oni kredas je ili.

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/02/21/590/>



Ĉi tio estas ekzemplo de normala distribuio. La horizontala akso montras hipnotigeblecon kaj la vertikala akso montras la kvanton de homoj. Estas klara ke la plejparto de homoj estas nur iom hipnotigebla.

Multaj eksperimentoj do montras ke hipnoto ekzistas. Kvankam multaj sciencistoj konsentas pri tio, la ekzakta meĥanismo daŭre ne estas klara. Pri la detaloj oni povas senfine diskuti, sed oni povas pli malpli kategoriigi la ideojn laŭ du grandaj teorioj. La unua estas ke hipnoto estas malsama stato de konscio, same kiel ekzemple dormo aŭ meditado. Laŭ

Financa laborgrupo volas ke UEA draste ŝparu el Libera Folio

UEA ne plu dungu oficistojn en Roterdamo sed movu laborojn al malpli kostaj landoj. La revuoj kaj Jarlibro de UEA ne plu aperu sur papero. La asocio eble liberiĝu de la neprofitita libroservo. Jen proponoj de la financa laborgrupo de UEA por savi la asocion de bankroto.

En decembro la komitato kun granda malfruo kaj post longaj diskutoj fine akceptis severe deficitan buĝeton por la jaro 2018. La planata deficiito de la asocio dum la nuna jaro estas 140.000

eŭroj, tiel ke la kostoj superas la enspezojn je 30 procentoj.


En la jaro 2017 UEA antaŭvidis deficiton de nur 9.450 eŭroj, sed la buĝeto montriĝis tute nerealisma. La subvencioj, per kiuj oni esperis savi la financojn de la asocio, ne estis ricevitaj, kaj la efektiva deficiito ŝajnas iĝi dekoble pli granda – absolute rekorda en la historio de UEA.

Konstatinte ke estas naive esperi ke hipotezaj subvencioj savos la buĝeton, la estraro do faris pli realisman buĝeton por la jaro 2018, kun eĉ pli rekorda

deficito.

Por savi la asocion de estonta bankroto, la eksa prezidanto kaj nuna komitatano Renato Corsetti interkonsente kun la estraro starigis komitatan laborgrupon por esplori la financojn de la asocio. Ankaŭ la prezidanto de UEA, Mark Fettes, partoprenis la laboron de la grupo.

Deficitoj de UEA 1994–2018



Supre: la mandatperiodoj de la prezidantoj. Sube: la oficperiodoj de la ĝeneralaĵaj direktoroj. La dua oficperiodo de Osmo Buller formale finiĝis en majo 2016, sed efektive jam fine de 2015. Ruĝe estas indikitaj prognozitaj deficitaj. Grafikaĵo de Libera Falo.

La raporto nun dissendita al la komitato de UEA estas skua legaĵo. Laŭ ĝi necesas rapida struktura reformo de la asocio, alikaze antaŭvideblas ke oni rapide foruzos la kapitalon kaj jam ene de kvin jaroj devos vendi la domon en kiu situas la Centra Oficejo.

Kvankam la tuta malneta posedaĵo de UEA estas preskaŭ 6 milionoj da eŭroj, el tio nur 660.000 eŭroj estas rekte kaj libere uzablaj, laŭ la laborgrupo. Sen du grandaj heredaĵoj (900.000 eŭroj en 1999 kaj 450.000 eŭroj en 2011) la asocio jam delonge estus bankrota, asertas la aŭtoroj de la raporto.


Krom la kronike deficitaj buĝetoj, grava problemoj laŭ la laborgrupo estas la aĝostrukturo de la membraro. La raporto konstatas: "Simple oni povas diri, ke de nun ĝis 20-30 jaroj la plej granda parto de nia nuna membraro estos malaperinta pro forpaso kaj restos ĉefe nur malmultaj nun junaj membroj."

La salajrokostoj kaj aliaj strukturaj kostoj laŭ la raporto nun estas duoble pli altaj ol la enspezoj. Por iom post iom forigi la konstantan deficiton la laborgrupo tial proponas drastajn paŝojn.

Ĉar la plej granda el la elspezoj estas la salajroj de la oficistoj (313.500 eŭroj en 2018), laŭ la laborgrupo necesas malpliigi tiun sumon "ekzemple per laŭgrada ĉesigo de kelkaj taskoj kaj funkcioj neesencaj aŭ per laŭgrada transdono de ili al personoj laborantaj en aliaj malplikostaj mondopartoj, kiam la nunaj prizorgantoj pensiigas".

Novaj oficistoj en Roterdamo ne plu estu dungitaj,

Aĝostrukturo de UEA-Membroj 2017 jarŝtupoj (5)



La aĝostrukturo de la membraro de UEA, laŭ la raporto de la financa laborgrupo. Grafikaĵo de UEA.

proponas la aŭtoroj de la raporto. Ĉar la libroservo vendas malpli da libroj kaj ne plu estas profita, UEA krome devus konsideri, ĉu fermi la libroservon en la Centra Oficejo kaj "transdoni tiun taskon al alia organizaĵo (ekzemple al jam ekzistanta alia libroservo ie en la mondo), kiu senpage aŭ eĉ profitdone povus funkcii".

Anstataŭ oficistoj en Roterdamo UEA laŭ la laborgrupo "funkciigu la laborojn de la Centra Oficejo (almenaŭ parte) en malmultekostaj landoj, prefereble kontraktante por difinita laboro ol per dungado en aldona sidejo." Tiel laŭ la grupo eblas "signife malgrandigi la kostojn kaj universaligi nian movadon".

Krome UEA estonte eldonu gazetojn kaj Jarlibron nur rete, opinias la laborgrupo. La oficejo en Roterdamo laŭ la laborgrupo ja estu konservita, sed tie laboru nur malmultaj oficistoj, kiujn helpu volontuloj. "Tiel certe eblas efike ekvilibrigi la financon de UEA kaj eblas vivkapabligi la organizon por multaj jardekoj."

La prezidanto de UEA, Mark Fettes, partoprenis la laboron de la grupo. Li grandparte konsentas pri la konkludoj prezentitaj en la raporto, li skribas en la diskutejo de la komitato, interalie rilate tion, ke anstataŭ dungi oficistojn en Roterdamo UEA kontraktu homojn en malpli kostaj landoj.



"Tamen, ĉar UEA estas jure registrita en Nederlando kaj tie havas siajn ĉefajn posedaĵojn, ne eblas simple diri 'ne plu dungi en Roterdamo'. En la fino tio eblas nur per plena translokigo de la Centra Oficejo al alia lando. Evidente ni ne povas ekskludi tion kiel eblon, sed temus pri tre komplika kaj multekosta paŝo, pri kiu ne okazis seriozaj esploroj kaj diskutoj en la laborgrupo", skribas Fettes.

Laŭ li la estraro serĉas manierojn plivastigi la retajn servojn de la asocio, kun la celo malfermi vojon al nurreta membreco. Tamen li atentigas, ke la en la laborgrupo mankis interkonsento pri la ideo tute

rezigni pri paperaj revuoj kaj Jarlibro.

Plej gravas laŭ la laborgrupo ŝanĝi la membrosistemon kaj oferti servojn, kiujn homoj nuntempe efektive volas havi. Prio tio Mark Fettes plene konsentas:

”Tio estas la ĉefa celo de la reteja modernigo, kiu estas en la tagordo de la Estraro jam de 2013, sed kiu bezonas la plenan kunlaboron de la Centra Oficejo por realiĝi. Nur nun ni finfine havas la bezonatajn kondiĉojn por sukceso, kaj mi antaŭvidas ke tio komencos porti rezultojn ĉi-jare.”

Krom la interveno de Mark Fettes, en la komitata diskutejo aperis nemultaj komentoj pri la apokalipsa raporto de la financa laborgrupo. Komitatano Edvige Tantin Ackermann volas scii, ĉu la estraranoj laboras senpage, kaj kiuj aliaj, krom dungitoj, ricevas monon de la asocio por siaj servoj.

”Bonvolu ne diri ke tiuj ĉi estas sekretaj informoj: la membroj pagas kaj rajtas scii kiamaniere la mono estas eluzita kaj la komitato havas la devon kontroli kaj sekve scii precize, precipe kiam katastrofa financa situacio kondukas al nuligo de la asocio”, ŝi skribas.

La emerita ĝenerala direktoro Osmo Buller opinias, ke la raporto grandparte ripetas malnovajn kredojn kaj asertojn. Laŭ li tute ne veras, ke UEA pereos post kvin jaroj, se oni faros nenion, ĉar la financa bazo de UEA tute ne limiĝas al ĝia ĝenerala kapitalo.

”Oni diras, ke UEA jam estus bankrota sen grandaj heredaĵoj en 1999 kaj 2010. Tia eldiro estas sensenca, ĉar se vere oni ne ricevas tiujn heredaĵojn, oni siatempe kompreneble farus la necesajn agojn kaj adaptojn por povi vivi sen ili. En la sama periodo UEA krome ricevis multajn aliajn heredaĵojn, ankaŭ sufiĉe grandajn, same kiel ĝi ricevadis dum jardekoj antaŭe”,

li skribas.

Laŭ Buller UEA nun mem subfosas siajn ŝancojn ricevi pliajn donacojn kaj heredaĵojn, distrumpetante pri asertata risko de bankroto.

”Por ke oni memoru pri UEA en testamentoj, ĝia bildo devas iĝi pli bona ol nun. Ĝi devas aperi kiel serioza kaj fidinda organizaĵo kun serioza kaj respektoveka gvidantaro. Tio postulas ne laŭte antaŭanonci sian morton sed multon alian”, li skribas.

Ankaŭ la ripetigantaj diroj pri la formorto de la membraro pro ĝia alta mezuma aĝo laŭ li estas nur mito, ĉar la estonteco de UEA kaj Esperanto estas ne la junularo, sed la komencantoj.

”Ili estas nia vera junularo sendepende de tio, ĉu ili estas junaj aŭ maljunaj. Ke homoj vivas sanaj pli longe kaj havas pli da tempo kaj ofte eĉ mono, pligrandigas la potencialon por ni.”

Anstataŭ lamenti, la gvidantoj de la asocio laŭ li devus dediĉi pli da energio al varbado de novaj membroj.

”Tio estas unu el la grandaj neglektoj de la nuna estraro, kiu ekzemple en 2016 ekkonsciis nur meze de decembro, ke tiujare UEA perdis 900 membrojn. Pli frue la afero ne interesis ilin kaj tiam estis jam tro malfrue.”

La plena raporto de la laborgrupo legeblas **ĉi tie**.

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2018/03/04/financa-laborgrupo-volas-ke-uea-draste-sparu/>



Kiom ajn la prezo, Bitmono estas monaĉo

el la blogo Teo kaj Libroĵ

Bitmono denove estas diskutita kaj preparolita pro la grandega kresko en sia prezo. Dum 2017, la prezo saltis de \$1,000 al preskaŭ \$20,000 kaj iuj deklaris ke ĝi estas “La mono de la estonteco”.

Kompreneble tiuj voĉoj malaperis kiam ĝi kolapsis al nur \$6,000, perdinte du trionoj de sia valoro. Sed paŝo post paŝo ĝi rekreskas al \$10,000, do multaj homoj demandas, ĉu la prezo denove altiĝos? Sed ĉi tiu pensmaniero estas eraro. Bitmono estas (aŭ estu) valuto, do la plej grava afero ne estas la prezo sed kiom da homoj elspezas ĝin. Valuto sen elspezo estas kiel aŭto sen benzino. Se homoj neniam uzas ĝin, ĝi malsukcesis kiel valuto kaj nur estas ponzi-skemo por riĉiĝi senlabore.

Sub ĉiu artikolo pri bitmono ĉiam estas la samaj komentoj. Homoj bedaŭras ke ili jam ne aĉetis bitmonerojn kiam la prezo estis malaltega, ĉar se ili

faris, nun ili estus riĉaj. En ĉiu bitmono-babilejo la konsilo ĉiam estas “tenu” kaj oni preskaŭ neniam vidas diskutojn pri homoj kiuj elspezis bitmonerojn. Ĉi tiu estas strangegega, ĉu ne? Kia valuto malkuraĝigas uzon?

Homoj ofte debatas ĉu io subtenas la prezon de bitmono aŭ ĉu ĝi nur estas ŝajno? Male al aliaj valutoj, ne estas iu ŝtato kiu subtenas ĝin, sed teorie la bitmona ekonomio (la homoj kaj vendejoj kiuj elspezas bitmonerojn) subtenas la valoron. Sed la problemo estas ke tiu ekonomio apenaŭ ekzistas. Nur iomete da vendejoj uzas bitmonon kaj eĉ ĉe tiuj, apenaŭ iuj klientoj iam aĉetas iun per bitmono. Pro la deflacio de la valuto, nenio instigas la elspezon de la mono, fakte la bitmona ekonomio punas elspezon. Imagu se oni elspezis siajn bitmonerojn kiam la prezo nur estis \$1,000? Tiu homo certe sentas sin stulta ĉar ĝi

maltrafis la saltegon. Sed ĉar ĉiuj atendas por la kresko de la prezo, neniu iam elspezas la monerojn.

\$1, ĉar neniu plu elspezas aŭ sendas bitmonerojn.

La plej aĉa afero estas ke bitmono disfalis

kvankam la kvanto da uzantoj malgrandas. Kiel mi jam diris, estas vere malmultaj lokoj kie oni povas elspezi bitmoneron kaj malmultaj homoj uzas ĝin kiel valuto. Se sistemo fiaskis pro tiu malpeza ŝarĝo, kiel eblas funkcii se ĝi estus populara? Se la populacio de iu malgranda urbo provis uzi bitmonon ĉiutage, tiu denove tro ŝarĝus la sistemon. Bitmono nur kapablas 7 pagojn sekunde teorie kaj vere tiu nur estas 3. Kiel tiu sistemaĉo povas anstataŭigi la sistemojn

de Visa kiu kapablas 60,000 sekunde.

La komunumo de bitmono jam bone konas ĉi tiuj difektoj sed la plano de la mono malhelpas solvon. Subtenantoj fanfaronas ĉar la sistemo estas malcentra kaj neniu mastrumas ĝin, sed ĉi tiu signifas ke neniu povas ripari la difektojn. Do, kvankam la plejparto de homoj konsentas ke estas solvendaj problemoj, ne eblas solvi ilin. Teorie, oni povas ŝanĝi la sistemon se estas "interkonsento" sed atingi tiun neebliis. Dum monatoj, la komunumo disiĝis pro debato pri la grandeco de blokoj, kiu preventis la kotizan krizon sed pro la malcentrismo ne eblis konsenti.



Alia grava problemo de bitmono estas ke ĝi uzas vastan kvanton da energio. Oni taksas ke bitmono uzas tiel multe da energio **kiel mia lando** (la Respubliko de Irlando). Ĉi tiu fakto estas freneza ĉar vere malmultaj homoj uzas bitmonon, do imagu kion okazus se multaj homoj uzus ĝin ĉiutage? Irlando uzas tiom da energio por la vivoj de kvar milionoj da homoj, bitmono malŝparas la energion sen utile.

Iuj diras ke bitmono havas problemojn sed la blokĉeno vere valoras. Sed honeste la blokĉeno estas solvo serĉante problemon. Post naŭ jaroj **neniu malkovris utilan uzon** por ĝi, plejparto de la proponoj ne utilas aŭ jam ekzistas. Ekzemple oni proponas ke oni povus uzi la blokĉenon por konfirmi kontraktojn, sed juristoj jam faras tiun. Eĉ kun la blokĉeno, oni ankoraŭ bezonas juristojn, do la blokĉeno nur aldonas plian paŝon. Ankaŭ, malmultaj homoj volas ke la kontrakto estas publika kaj videbla al la tuta mondo.

Alia propono estas por krei ĵetonononjn, ligi ilin al la blokĉeno kaj iu aĵo por kontraŭi ŝteladon kaj falsado. Tamen, la ĵetonoj ne vere ligas al la produkto, do iu povus ŝteli la aĵo sed forsendi la ĵetonon kvazaŭ ili ankoraŭ estas kune. Ĉi tiu sistemo ne faras iun kiu ne



La prezo de bitmono dum la pasinta jaro

Kvazaŭ tiu ankoraŭ ne kaŭzis sufiĉe da problemoj, antaŭ nelonge granda katastrofo frapis bitmonon. Subtenantoj de la mono ofte propagandis ke ĝi estas valuto rapida kaj senpaga. Ili kredis/esperis ke ĝi anstataŭigus tradiciajn sistemojn por interŝanĝi monon ĉar laŭ ili, la kotizoj estis tro altaj kaj oni devis atendi tro longe. Eĉ estis troigita parolado pri "bitmono por la senbankuloj" kun la espero ke malriĉuloj en afriko kiuj ne havas bankkontojn uzus bitmonon (ĉi tiu espero neniam havis logikon).

Tamen, ĉi tiuj espero kaj revoj estis detruitaj kiam la transakciaj kotizoj iĝis altegaj dum decembro. Je bitmono, ĉiuj transakcioj eniras vicon ĝis ili estis konfirmitaj, sed oni povas tuj iri al la komenco de la vico, se oni ofertas pagon (ju pli alta la pago, des pli rapida ĝi estas akceptita). Sed antaŭ nelonge, grandega ŝtopo okazis kaj pro tio, uzantoj devis aŭ atendi tagojn aŭ pagi multkoste. **La kotizoj estis kolosaj** kaj pli ol \$10 dum decembro kaj januaro, je la plej alta je \$35. Tiuj estas multe pli ol iu banko aŭ kreditkarto kaj malebligas uzon kiel valuton. Kiel iu povus uzi bitmonon ĉe kafejo se la kotizoj kostas pli ol la kafo kaj oni devas atendi tagojn ĝis la spezo estas konfirmita? Pro la fluktado de bitmono, kiam la pago finfine okazas, la prezo multe ŝanĝiĝus, do oni grande tro aŭ maltro pagis.

Ĉi tiu estas serioza krizo por la bitmona ekonomio kaj malkuraĝigis sian uzon kiel valuto. Kelkaj el la plej grandaj uzantoj de bitmono ĉesis akcepti la monon ĉar la problemoj estis tro grandaj. **Steam** (la populara komputil-luda vendejo) kaj **Stripe** (la kreditkarta kompanio) ambaŭ ĉesis akcepti bitmonon pro la altaj kotizoj kaj longaj atendtempoj. La plej honta (aŭ amuza, laŭ via plaĉo) estis kiam eĉ konferenco por promocii bitmonon **rifuzis akcepti pagojn per bitmono**. Kiam eĉ la plej fortaj subtenantoj ne uzas la monon, tiel evidentas ke ĝi havas tre seriozajn problemojn. Ĉi tiuj problemoj pli malpli mortigis bitmonon kiel valuto ĉar pagoj kaj transakcioj preskaŭ malaperis. Nuntempe kotizoj estas malaltaj, malpli ol

jam ekzistas kadre de stokkontrolado. Oni diras ke iu povus uzi la blokĉenon por voĉdoni sen sciante ke tiu tute kontraŭas la sekretecon de la baloto kiu estas kerno de demokratio. Oni povas krei "inteligentajn kontraktojn" kiuj ekzemple pagas la luadon de loĝejo aŭ aŭtomate sendas monon kiam iu aĵo alvenas. Sed tiu ĉi teknologio jam ekzistas, ĝi estas aŭtomata debeto.

Kiam oni havas martelon, ĉiu problemo aspektas kiel najlo, kaj blokĉenaj subtenantoj agas kvazaŭ la blokĉeno estas tia martelo. Neniu intervjuis vendejojn, malkovris la plej gravaj problemoj kaj tiam konstruis bitmonon kaj la blokĉenon por solvi la problemojn. Anstataŭ ni havas komputilistoj kiuj pensas ke ĉiuj problemoj solveblas per komputiloj. La teknologio por rapide sendi monon kaj informon jam ekzistas, oni enmetas paŭzojn por kontroli kaj konfirmi la detalojn. Ekzemple, se oni pagas por io ĉe Amazon, sed la vendisto ne sendas la aferon, mi povas ricevi repagon. Bitmono forigas ĉi tiun protekton.

Mi ankoraŭ ne menciis la oftegan ŝteladon kaj trompo de bitmono. Ĉi tiu estas tiel grandega kaj konata problemo, ke mi ne bezonas klarigi ĝin. Almenaŭ ĝi instruas kial financaj leĝoj kaj protektoj ekzistas kaj kiel ĥaose estus senŝtata mondo.

Iu defendas bitmonon dirante ke ĝi estas nova kaj ankoraŭ bezonas tempon por kreski kaj evolui. Sed ĝi ekzistis dum naŭ jaroj, kiu estas longega en interreta tempo. Homoj ne bezonis naŭ jarojn por lerni ke retmesaĝoj utilas (se post naŭ jaroj ankoraŭ neniu uzis siajn retadresojn, oni certe deklarus malsukceson). Kiom pli da tempo bitmono bezonas? Ĉu post 5 aŭ 10 jaroj homoj ankoraŭ diros ke ĝi bezonas pli da tempo? Homoj jam iras al novaj ciferamonoj anstataŭ bitmono. Mi ne scias sufiĉe por juĝi, sed certe multaj homoj kredas ke ili funkcias multe pli bone ol bitmono.

Do, tiel mi kredas ke kiom ajn estas la prezo de bitmono, tute ne gravas. Kiel valuto ĝi aĉas kaj malsukcesas. La prezo povas esti iom ajn sed se neniu elspezas ĝin, valute ĝi malsukcesis. Tiu ne signifas ke bitmono estas senutila, la plejparto de homoj traktas ĝin kiel investo kaj por aĝiotado. Se oni nur aĉetis bitmonon pro espero de riĉeco, sufiĉas sed ne ŝajni ke ĝi estas la valuto de la estonteco.

Fonto: <https://teokajlibroj.wordpress.com/2018/02/26/kiom-ajn-la-prezo-bitmono-estas-monaco/#more-700>

LAŬ ĈIES PLAĈO

Poemo de Kálmán KALOCSAY

La patro kun la juna filo
azenon portis al foiro.
La patro en la selo sidis,
la filo la azenon gvidis.

Survoje venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!
Jen viro en la sel' komforta,
dum marŝas la infan' malforta."

La patro, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
de la azeno do descendis
kaj rajdi sian filon sendis.

Sed ree venis hom' renkonte,
kaj tre indignis: "Estas honte!
Jen knabo en la sel' komforta,
dum marŝas la aĝul' malforta."

La knabo, je l' indigna voĉo,
sin savi volis de riproĉo,
do saltis de l' azena dorso.
Nun ambaŭ marŝis, sen rimorso.

Sed venis homo, miris multe,
kaj kriis "Vere, estas stulte!
Dum vi lacigas vin per marŝo,
promenas la azen' sen ŝarĝo."

Do, kion fari? Patro, filo
demandis sin kun maltrankvilo.
Interkonsilis kaj decidis:
Nun ambaŭ en la sel' eksidis.

Sed ree venis hom' renkonte,
indignis ege: "Estas honte!
Sur povra besto ŝarĝ' duobla!
Fi, kia kruelec' malnoblaj!"

La du, en malesper', per ŝnuroj
l' azenon ligis ĉe la kruroj,
kaj ĝin per stango traŝovita
plu portis kun klopodo ŝvita.

Sed venis hom' kaj ĝis eksceso
ridante kriis: "Jen frenezo!
Azenon vivan oni portas!
Ho ve, mi de ridego mortas!"

La patro diris al la filo:
"Mi estas vere sen konsilo:
Ĉu la azenon do mortigi,
aŭ nin ĉe kol' sur branĉon ligi?"

-de Kálmán KALOCSAY



La printempa bulgara popolkutimo "Avino Marta" sendis Ketii Foteva, el Bulgarujo

Avino Marta estas unu el la plej respektataj, malnovaj, unikaj Bulgara kutimoj, kiu restis ĝis la nuntempaj tagoj. Ĝi estas festata en la unua de

marto. En tiu tago homoj donacas al siaj amatoj, familianoj, konatuloj, kolegoj ktp specialan amuleton nomita "martenica" por sano kaj forto dum la tuta jaro.

Martenicojn oni interŝanĝas en la 1-a de marto, kiam la bulgaranoj komencas la novan ekonomian

jaron. Ankaŭ martenica estas la simbolo kaj saluto al la printempo. Ĝi estas simpla ornamaĵo el torditaj blankaj kaj ruĝaj lana fadenoj - ĉi tiu estas la "klasika martenica", kun kiu bulgaranoj renkontas la unuan de marton ekde pratempoj. Nuntempe, junuloj kutime ligas martenicojn cirkauĉe la manradikon.

Samtempe urbaj loĝantoj metas martenicojn al siaj maskotoj kaj vilaĝanoj – sur siaj hejmbestoj. Sed ĉi tiu havas siajn radikojn en la tradicio. Dum la pasinteco oni pensis, ke martenitsa estis amuleto. Homoj kredis, ke ĝi protektas homojn, brutojn, domojn kaj la tutan

bienon de la "malbonaj potencoj" de la foriranta vintro.

En la bulgara folkloro Avino Marta estas unueca monato kun virina nomo, konata pro ŝia kaprica moro. Se ŝi ridetas kaj ridetas, la suno brilas kaj fariĝas varmece, sed se ŝi koleras, tiam ekblovas venton kaj nuboj malheligas la sunon. Laŭ la kredo, je la unua de marto Avino Marta inspektas homojn kaj kultivaĵojn, vestita en ruĝa robo, envolvita kun ruĝa antaŭtuko kaj portante ruĝan sxtrumpojn.

Plej populara ĝis hodiaŭ estas la tradicio, ke homoj vidante ekflorantan arbon, ili surmetas martenicon sur tiu arbo por fruktodoneco kaj riĉa rikolto.

verkis kaj sendis **Ketii Foteva**, el Bulgarujo



Historiaj periodaĵoj nun rete traserĉeblaj el Libera Folio

La kompletaj tekstoj de multaj jarkolektoj de pli ol 70 Esperanto-periodaĵoj, ekzemple tiuj de la revuo Esperanto de 1905 ĝis 1946, estas nun plene serĉeblaj en la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Ni petis Bernhard Tuidler, la estron de la kolekto, rakonti pli.

Periodaĵoj estas ege gravaj fontoj, kiuj bone dokumentas la internaciajn kaj regionajn historion, politikon kaj kulturon. Ili aj ciferecigo kaj interreta disponigo havas gravajn avantaĝojn. Ili iĝas facile kaj rapide alireblaj por multaj personoj, ĉar ili estas atingeblaj tutmonde ĉe ĉiu retaliro, ĉiutage kaj ĉiuhore.

Post la ciferecigo la paperaj periodaĵoj restas en la klimatizita kaj sekura librokonservejo, kiun ili forlasas nur esceptokaze, ekzemple se la biblioteko pruntedonas ilin por ekspozicio. Krome la tekstrekonaĵ algoritmoj nun faras la enhavon de la dokumentoj plene alirebla per tute novaj esplorstrategioj.

Ĝis nun la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo elektis pli ol 70 titolojn de periodaĵoj el la periodo 1889 ĝis 1946, kiuj estis skanitaj de specialistoj en aparta "Sekcio por ciferecaj servoj" de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

La ciferecigo kaj publikigo de la havaĵo ankaŭ ludas gravan rolon en la t.n. Vizio 2025 de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Tiel la nombro de ciferece konsulteblaj dokumentoj – libroj, periodaĵoj, fotoj,

bildpoŝtkartoj, muzeaj objektoj, afiŝoj, sondokumentoj kaj arkivaĵoj – daŭre kreskos ankaŭ dum la venontaj jaroj.

Ekde 2006 la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko entreprenis plurajn projektojn pri ciferecigo.


Ĝis nun estas realigita la enkomputiligo de **pli ol 1.100 libroj** (inter ili pli ol 200 pri **la unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto** kaj pli ol 180 de aŭ pri Ludoviko Zamenhof), **pli ol 70 diversaj periodaĵoj** kun pli ol 900 jarkolektoj, ĉirkaŭ 7.300 fotoj, 2.500 bildpoŝtkartoj, 2.500 muzeaj objektoj, 800 afiŝoj kaj 200 sonbendoj.

Krom la sonbendoj, ĉiuj tiuj dokumentoj estas konsulteblaj pere de la **katalogo Trovanto**, la katalogo de la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-muzeo.

En la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko vi povas ne nur trarigardi nian havaĵon, sed pere de la retejo **ANNO** eĉ eblas sisteme traserĉi la jam ciferecigitajn periodaĵojn.

ANNO (AustriaN Newspapers Online) estas la virtuala legsalono por la periodaĵoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

ANNO ebligas al vi entajpi serĉvorton en la kampoj





Du katoj babiladas sur la tegmento de alta domo.
 — Karulo, mi aŭdis, ke vi lernas la lingvon de la hundoj. Kiel progresas via lernado.
 — Jes, mi lernas ĝin. Nuntempe ni katoj devas scii ankaŭ hunde, se ni deziras komuniki. Laŭ mi, mia lingvoscio jam estas sufiĉe bona. Mi ellernis multe da vortoj kaj esprimoj. Certe la hundoj komprenus min, se mi parolus kun ili.
 — Ĉu ankoraŭ vi ne provis vian lingvoscion?
 — Ankoraŭ mi ne havis okazon. Sed mi tre ŝatus scii, kiel mi regas ĉi tiun lingvon.
 — Mi havas grandiozan ideon. Antaŭ tagoj en la najbaran domon translokiĝis hundo. Ĝia nomo estas Hektor. Onidire ĝi estas tre timiga besto. Mi proponas al vi, ni iru tien kaj ni provu konatiĝi kun ĝi. Se vi perfekte scias la hundolingvon, tiam ni povos fari packontrakton kun la hundo kaj estigi eternan hundo – kato - paciĝon unue en la mondhistorio. Ni pruvos, ke hundoj kaj katoj povas vivi en paco unu kun la alia. Kiel vi opinias pri mia ideo.
 — Grandioze, amiko! Ni iru al tiu timiga hundo kaj mi parolos kun ĝi.

La du katoj tre ekĝojis kaj trarapante la altan barilon singardeme iris al la timiga hundo, kiu unue rigardis ilin iomete malamikeme. En ĝi ekbolis la praa instinkto kaj volis distranĉi aŭ almenaŭ peli la katojn, sed fine ĝi mildiĝis.
 — Kial vi ellernis la hundolingvon? – ĝi demandis.
 La kato ekridis kaj respondis:
 — Ĉiuj katoj scias, la hundolingvo estas la plej valora en la bestomondo, kaj nun jam ankaŭ la katoj ne povas ekzisti sen ĝi.
 — Prave – kapjesadis kontente la hundo. – Ĉu ankaŭ via kunulo parolas nian lingvon?
 — Ĝi ankoraŭ ne, sed morgaŭ ĉiuj katoj komencos la lernadon, se ni povos subskribi la packontrakton.
 — Bone, bone – konsentis la hundo. – Mi volonte subskribos la packontrakton, se krom la lingvoscio vi donacos por mi grandan medoloston en ĉiu monato.
 La katojn ege surprizis la peto kaj malgajiĝis.
 — Kiel akiri medoloston en ĉiu monato? Kion vi ofertas por la paco? Ni ellernos vian lingvon. Sed vi faras nenion.
 — Vi volas pacon. Ĉu ne?
 — Jes, tial mi ellernis via lingvo.
 — Sed ne perfekte. Mankas akuzativo kaj ĝi tre kolerigas min. Vi diris antaŭ nelonge, ke vi ellernis mian lingvon perfekte. Vi faris gravan gramatikan eraron. Tio ĉi ne estas pardonebla.

En la hundo ekbrulis la praa instinkto kaj tuj eksaltis.
 — Revenu al mi, se vi efektive scias mian lingvon perfekte kaj ne forgesiĝu pri medolosto. Sen ĝi mi ne subskribas la packontrakton.
 La du katoj aŭdante ĉi tion, sentis, estos pli bone forkuri. Vane ili deziras paciĝi kaj amikiĝi kun la hundo Hektor, se ne estas medolosto ĝi ĉiam trovos gramatikan eraron en la lingvoscio de la katoj.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario



Post kelkaj minutoj ili jam estis ĉe la barilo de la domo, kie vivis la hundo.
 — Saluton, amiko hundo! – enkriis la kato en

hundolingvo. – Ni venis por paciĝi kun vi kaj ĉiuj hundoj. Ĉu vi akceptas nian amikecon?
 Unue la hundo longe silentis. Ĝi ne volis kredi, ke ĝi aŭdas paroli katon en sia lingvo.
 Kiam ankaŭ duafoje ĝi aŭdis la peton, ĝi ekbojis:
 — Venu ĉi tien por ke mi vidu vin! Se vi parolas senerare gramatike eble mi akceptas vian proponon.


“Text” (teksto) aŭ “Titel” (titolo), elekti unu el 17 lingvoj – inter ili Esperanto – kaj specifi la serĉon laŭ la eldonloko kaj eldonperiodo.
 Ekzemple, se vi entajpas en la kampo “teksto” la vorton “Zamenhof”, elektas kiel lingvon “Esperanto” kaj alklakas “Suchen” (serĉi), vi ricevas 1913 rezultojn. Tio signifas, ke en 1913 numeroj de skanitaj Esperanto-periodaĵoj la nomo “Zamenhof” aperas almenaŭ unufoje.

serĉrezultoj, vi malfermas novan fenestron, kie ruĝaj kadroj indikas, sur kiuj paĝoj la vorto “Zamenhof” estas notita.

Se vi alklakas unu el tiuj paĝoj, ĝi pligrandiĝas, por ke vi povu legi la tekston kaj ankaŭ krome tuj vidi, kie kaj kiom ofte aperas la serĉovorto, kiu estas ruĝe markita.

Tiel eblas esplori pri diversaj temoj en la gazetaro de la koncernaj jaroj. La plej rekomendindaj serĉvortoj estas nomoj de personoj, landoj kaj urboj, sed fakte oni povas entajpi ĉiun ajn temon, pri kiu oni interesiĝas.

Bernhard Tuider



Alklakante unu el la

Vi estas en via laboro/ekskurso/prelego/ktp kaj emas manĝeti sed nur eblas aĉeti multsukeraĵojn de iu maŝino. "Damne!" vi pensas dum via stomako petas atenton kaj la horloĝo indikas ke ankoraŭ mankas tempo ĝis la tag-/vespermanĝo. Tiam vi memoros tiun ĉi recepton kaj komprenos vian eraron kiam vi pigris kaj ne preparis tiun ĉi recepton. Nun, ke vi revenas al ni, sekvu la venontan recepton

Tempo: 30 minutoj

Komplikeco: malalta

Ingredientoj por 24 stangetoj:

- 3 bananoj tre maturaj;
- 100 gramoj da sekitaĵ daktiloj sen semoj;
- 500 gramoj da aven-flokoj;
- 50 gramoj da heliantaj semoj;
- 50 gramoj da kukurbaj semoj;
- 100 gramoj da haketitaj aveloj;
- 4 manĝkuleraj da pomkompoto sensukera.

Paŝoj:

1. Varmigu la fornon ĝis 180°C kaj preparu bak-pleton kun bakpapero.
2. Premu la bananojn per forko ĝis havi paston homogenan.
3. Tranĉu la daktilojn en malgrandaj eroj.
4. Miksu la flokojn, semojn, avelojn kaj daktilojn en iu bovlo. Aldonu la paston kaj uzu viajn manojn ĝis vi havos homogenan miksaĵon. Faru same kun la



pomkompoto ĝis vi havos gluan paston.


5. Metu la paston sur la bakpapero, etendu ĝin kaj donu formon tiel ke sia dikeco estos pli malpli 1-centimetra.

6. Tranĉu en stangetoj kaj konservu ilin en hermetika ujo kaj en fridujo.

7. Ne plu suferu mankon de malmultsukeraj veganaj bongustaj manĝetaĵoj!

Recepto kaj kunlaboro de "Charles Fischer" el Germanio!

Fonto: <http://veganarto.net/musliaj-stangetoj/>



Kalendaro pri Esperanto-Renkontiĝoj

INTERNACIA KALENDARO - PRI ESPERANTO-RENKONTIĜOJ

- Vojaĝu al Esperanta renkontiĝo! Serĉu kaj trovu simpatian aranĝon laŭ iliaj priskriboj!
- Se mankas iu aranĝo, anoncu kaj registru ĝin senpage!
- Diskonigu, reklamu la Kalendaron al viaj Esperanto-amikoj!

Adreso de la Kalendaro:

<http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Bonan vojaĝon,
agrablajn travivaĵojn!
László Szilvási, LS



1	M	A	R	A	T	E	R	E	L	O	A	L	O	A	T
2	A	N	A	K	E	S	O	R	E	G	U	L	O	R	
3	N	A	K	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R	
4	A	R	A	K	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R
5	R	A	K	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R	
6	K	I	O	R	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R
7	I	O	R	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R	
8	O	R	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R		
9		O	R	E	S	O	R	E	L	O	A	L	O	R	
10	I	N	Ĝ	E	N	I	A	N	O						
11	A	D	E		I	A									
12	M	A	N	G	A	N	O								



Solvo de la kruccort-enigmo